

人民中國報道

# El Populo Cínico

Aũg. 1952

8



# Pligrandigu la Batalforton de la Partio por Bonvenigi la Grandan Taskon de la Landa Konstruado

*Ĉefartikolo de la Pekina "Popola Tagjurnalo" en la 1-a de julio por celebri la 31-an datrevenon de la Ĉina Komunista Partio*

La granda, glora kaj korekta Ĉina Komunista Partio nun jam marŝis 31 jarojn sur la longa vojo de ĉina revolucio kaj konstruado.

Dum la pasinta jaro nia Partio gvidis la ĉinan popolon por daŭrigi la justan lukton rezisti Usonan invadon kaj helpi Koreion; plenumi agraran reformon en la kamparo de la vastaj regionoj antaŭnelonge liberigitaj; akiri grandajn sukcesojn pri la plifortigo de nacia defendo, la plialtigo de industria kaj agrikultura produktado, la disvolvo de fervoja komuniko kaj akvokonserva konstruado, la popularigo de kulturo kaj la remuldo de ideologio. Nia Partio ankaŭ gvidis la laborantojn en ŝtataj institucioj konduki grandskalan kampanjon kontraŭ koruptiĝo, malŝparo kaj burokratismo kaj gvidis la vastajn popolamasojn kaj industriajn kaj komercajn rondojn disvolvi kampanjon kontraŭ subaĉetado de la personaro en registaraj kaj publikaj organizoj, kontrabando kaj evitado de impostoj, ŝtelado de ŝtataj proprajoj, trompo ĉe ŝtataj kontraktoj kaj ŝtel-akirado de ekonomiaj informoj el registaraj institucioj por spekulacio. En ekstreme viveca maniero tiuj du grandaj kampanjoj profunde edukis la popolon tra Ĉinio, kritikis la malhelan flankon de korupto kaj degenero de la burĝaro plifirmigante la Popolan Demokratan Unuecan Fronton kaj estigis novan socian moralon. Ili ebligis grandan reformon en la laboro de ĉiuj registaraj institucioj kaj organizoj kaj multaj novaj inventoj kaj novaj personoj aperis sur la sceno, pretigante bonajn kondiĉojn por la venonta, grandskala landkonstrua laboro.

En tiuj ĉi du grandaj kampanjoj la tuta organizo kaj ĉiu membro de la Ĉina Komunista Partio trapaŝis provon de historia signifo. Tia provo estas necesa en la procedo de la grandegaj revoluciaj venkoj de eniro en la urbojn el la kamparo kaj disvolviĝo de la regpotenco de disigitaj revoluciaj bazlokoj al tiu de la tuta lando. Faktoj pruvas ke la Ĉina Komunista Partio kapablas gvidi la ĉinan popolon ne nur por atingi revoluciajn venkojn sed ankaŭ por konstrui sian novan landon kun mirinda rapideco. Malgranda nombro da partianoj kiuj ne povis elporti tian provon falis apudvoje. Tamen nia Partio kiel batal-unuo, estas marŝanta multe pli fortika sur la vojo al novaj venkoj. Post tiuj du grandaj kampanjoj nia Partia organizo estos plifortigita kaj plifirmigita kaj ni daŭre plifortigos la konstru-laboron de nia Partio.

Nia tasko de la plifirmigo kaj konstruado de la Partio estas plialtigi la kvalitojn de la partianoj laŭ la normo de komunisto kaj pligrandigi la Partian batalforton, tiel ke ni povu gvidi la ĉinan popolon en la lukto por la industriigo de la lando kaj por socialisma estonteco. La Partio devas elimini burĝajn elementojn kaj fremdklasajn elementojn kiuj enŝtelis en la Partion, koruptajn kaj degenerajn elementojn kaj tiujn nekonverteblajn elementojn kiuj rifuzas edukadon fare de la Partio.

En fabrikoj, minejoj, kooperativoj, ŝtatorganizoj, lernejoj kaj ankaŭ en vilaĝoj la Partio devas neniom

malfortigi sian regulan, sisteman ideologian kaj politikan gvidadon. La laboro de la plifirmigo kaj konstruado de la Partio devas progresi mano-en-mano kun la landkonstrua laboro kaj precipe kun la ekonomia konstrulaboro koncentrigita en industriigo. La celo estas gvidi kaj antaŭenpuŝi landan konstruadon. Ĝi estas longdaŭra celo destinita por fari nian landon agrikulturan lando industria kaj antaŭenpuŝi nian landon al la estonteco de socialismo.

Ĉiu tago alportas nin pli kaj pli proksimen al la tasko de grandskala ekonomia konstruado. La laborista klaso kaj la cetera parto de la vastaj popolamasoj de tuta Ĉinio volas, unuflanke daŭrigi la plifortigon de la laboro rezisti Usonan invadon kaj helpi Koreion, kaj la plifirmigon de nia nacia defendo, kaj aliflanke ili bonvenigas la tajdon de ekonomia konstruado kun alta spirito malgraŭ malamika obstrukcado. La disvolviĝo de la movado de pliprodukto kaj ŝparo lanĉita de la laboristo-amasoj en industrio, agrikulturo kaj aliaj produktaj entreprenoj signas la alvenon de tiu ĉi tajdo. La popolamasa labor-konkursiva movado kaj la aperado de progresaj produktaj spertoj, novaj planoj kaj rekordoj okazigos grandajn ŝanĝojn en la trajtoj de niaj diversspecaj laboroj. Ni devas meti nian atenton sur tiujn novajn ŝanĝojn kaj aktive plikuraĝigi la amasojn antaŭenpuŝi la movadon pliprodukti kaj praktiki ekonomion sur ĉiu flanko. En tiu ĉi movado la tuta Partio devas pene lernadi. Komunistoj en industrio kaj agrikulturo kaj sur aliaj ekonomiaj frontoj devas doni bonan ekzemplon kaj gvidi la amasojn konstante plialtigi sian politikan konscion. Ili devas modeste lerni de la amasoj por pliriĉigi sian scion de tempo al tempo. Ili devas fariĝi mastroj de sia laboro, sin perfektigi en tekniko kaj plialtigi siajn kapablojn en mastrumado kaj administrado. Partiaj gvidanto-kadroj diversrangaj nepre devas unuigi ĉiujn sciencajn kaj teknikajn laborantojn volantajn servi la popolon, devas pliprofundigi enket- kaj esplor-laboron, analizi la situacion kaj resumi spertojn.

Estas tute sendube ke nia Partio kapablas gvidi la ekonomian konstru-laboron de nia lando. La Partiaj membroj devas batali kontraŭ ĉiuj malprogresemaĵoj, konservativaj ideoj kaj eraraj kapitalistaj ideoj pri ekonomia laboro. Ili ankaŭ devas studi sisteme la fundamentajn teoriojn de Marksismo-leninismo kaj la teorion de Maŭ Ze-tung pri ĉina revolucio.

Nia Partio jam travivis tridek unu jarojn. En tiuj tridek unu jaroj nia Partio gvidis la ĉinan popolon por efektiviĝi mondskuan ŝanĝon en kiu ni jam venkis kaj tiun venkon huraas la ĉina popolo. Ĉiuj partianoj kamaradoj devas ĉiam rilatiĝi intime kun la popolamasoj kaj lerni de ili. Ni devas praktiki regule kritikon kaj memkritikon. Ni devas esti modestaj kaj zorgemaj; ni devas esti nek fieremaj nek malpaciencemaj; ni devas kuraĝe bonvenigi la novan, grandan historian taskon antaŭ ni.

Trad. I. K.

# LA LUMO DE ĈINIO

Claude Roy\*

Mi ne povas priskribi en kelkaj paĝoj la riĉajn impresojn, emociojn kaj ideojn kiujn mia vojaĝo al Ĉinio alportis al mi. Mi scias ke tion plenumi per faro de ĉi tiuj notoj, kiel mi nun faras, estas ne eble —kaj mi miras ĉu mia vojaĝo efektive finiĝos per mia reveno al Francio. Mi scias ke por sufiĉe longa tempo mi ankoraŭ vidos antaŭ mi la vidaĵojn kaj pejzaĝojn de nova Ĉinio, songos pri ili, pensos pri ili, kaj gajnos spiritan kreskadon per kion ili donis al mi. Kiam tiu kolosa kaj superba rikolto estos enprenita, ventolita, draŝita kaj klasifikita, tiam, kaj nur tiam, mi povos entrepreni, en 3-400 paĝoj, esprimi kion mi travivis ĉi tie. Hodiaŭ mi povas nur provi pentri el miaj vojaĝnotoj kelkajn temojn kiuj venadas kiel gvidmotivoj de tiu grandioza simfonio—la liberigo de la ĉina popolo.

Liberigo—ni estis travibrigataj en Francio kiam la novaĵoj pri la liberigo de Ĉinio fare de la popolaj armeoj atingis nin. Pekino, Nankino, Ŝanhajo, Kantono . . . .la depeŝoj okupis pli kaj pli gravan lokon en niaj koroj kun la admiro kiun ni sentis al la verkisto-strategisto Maŭ Ze-tung. Ĉiu venko de la popola armeo estis konfirmo de la senerareco de la vidpunktoj de ĉi tiu granda pensulo kies genio tiel fortoplene analizis la principojn de nova speco de milito—revolucia popola milito.

Nur per persona vojaĝo al Ĉinio oni povas al si havigi veran senton, en konkretaj, homecaj, valoraj konceptoj, pri la profunda signifo de la vorto liberigo.

El la precizaj kaj brilaj konversacioj de ĉinaj artistoj kaj intelektuloj, el la mallerte, simple esprimitaj konfidoj de kamparanoj en la vilaĝoj kaj de laboristoj en la fabrikoj, mi nun aŭdas tiun ondegon kaj mem fariĝas parto de ĝi kiu kondukas la ĉinan popolon al li, la simbolo kaj gvidanto de ĉi tiu liberigo. Tio estas ne nur respekto kaj admiro kiujn ili sentas al Prezidanto Maŭ Ze-tung. Tiuj kiujn li triumfe gvidis tra la Longa Marŝo el mallumo en lumon sentas al li pli ol estimon aŭ fervoron: afekcion.

Por la laboristo, kamparano, eta komercisto kaj intelektulo de Ĉinio, la nomo Maŭ Ze-tung ne nur signifas grandan politikiston, por ili la Komunista Partio ne estas abstrakta organizo: por la kamparano, tiuj vortoj rememorigas la teron kiun li finfine kulturas por si mem kaj ne por iu ekspluatanto; por la laboristo, ili rememorigas semajnan laborpagon kiu ebligas al li aĉeti 100 funtojn da rizo dum sub la Kuo-mintanga tiraneco lia laborpago povis apenaŭ aĉeti 10 funtojn; por la komercisto ili signifas la finiĝon de liaj malfaciloj kaŭzitaĵoj de la ekspluatado de ĉinaj “merkatoj” fare de fremdaj komercistoj; por la intelektulo ili signifas la finon de embarasado de cen-zuro, de obskurantismo kaj de la regado de tiuj kiujn Pascal nomis “la armitaj vizaĝoj.” Jes, la veran signifon de la vorto liberigo oni povas ekkompreni nur per vivado inter la ĉina popolo, kaj nur per ekzemploj, per bildoj, oni povas provi pale esprimi ĝian superan belecon en kelkaj paĝoj. . .

Liberigo estis efektivigita per bataliloj de milito, sed ankaŭ kaj ĉefe, per bataliloj de rezono. Maŭ Ze-tung skribis, “Ni estas dankemaj al Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kiuj donis al ni batalilon. Tiu ĉi

batalilo ne estas maŝinpaŝilo, sed marksismo kaj leninismo.” Kio plej frapas la vojaĝanton en Ĉinio en 1952 estas la kredo de la gvidantoj de la ĉina popolo, de ilia avangardo, je la fortoj de rezonado, ilia kredo je homoj.

Ĉar eble la plej mirinda fakto pri Ĉinio estas la jena: 500 milionoj da popolanoj estas en lernejo. Ĉiu homo lernas, studas, sin perfektigas, sin kritikis kaj remuldas, ŝanĝiĝas kaj disvolviĝas, en Ĉinio hodiaŭ. Analfabetaj kamparanoj lernas ideografojn, multlegintaj profesoroj lernas vivi la vivon de kamparanoj, laboristoj lernas labori pli bone, respondecaj gvidantoj studas marksismo-leninismen, la infanoj kaj maljunuloj, viroj kaj virinoj—ĉiu partoprenas en tiu granda de Maŭ Ze-tung prezidata universitato kun 500 milionoj da studentoj.

Kaj kvankam la instruo kiun la ĉina popolo ricevas estas ĉefe praktika instruo el praktikado, tio estas ne mirinda ĉar tia instruo sin okupas pri dialektika materialismo; pri marksismo. Antaŭ ol modifi la mallarĝajn kaj falsajn vojojn de la intelektulo enkarcerigita malantaŭ la bariloj de artifika kulturo, estas necese plivastigi lian horizonton kaj pliriĉigi lian sperton. Scii la teorion de plusvaloro estas bone. Sed pli bone estas vivi konkrete la vivon de vilaĝano antaŭ kaj dum la agrara reformo por gajni komprenon kiu estas ne nur teoria koncerne kion plusvaloro signifas al la malriĉa, sentera kamparano. Mi renkontis en malproksimaj vilaĝoj de Nordĉinio kaj Sudĉinio pentristojn kaj poetojn, universitatajn profesorojn kaj pedagogojn. Ili estis ankaŭ en lernejo. Ili estis en lernejo, kiel ĉiuj aliaj en nova Ĉinio, en la lernejo de vivo, de lukto.

Sed ne nur la praktika studado, la agado, estas emfazata. Mi estas frapita de la interna klopodo, de la alvoko al memdisvolvo al ĉiu civitano. Studado estas ĉiam organizita en grupoj, en kolektiva maniero. Tio ne signifas ke memkulturado ne estas postulita de ĉiu persono. Tia verko kia la rimarkinda traktato de Liu Ŝaŭ-ĉi *Kiel Fariĝi Bona Komunisto* emfazas la fakton ke persona klopodo estas plej grava. Nenia provo estas farita por igi engluti ideojn kaj scion mekanike, pasive. Individua pensado kaj meditado, mensa “digesto” estas postulata. La laboro de menso-remuldado ne estas homilia laboro. Marksisto-leninisto scias ke “prediki” higienon al la kamparanoj kaj al la malriĉuloj estas ne sufiĉe, sed ke estas necese doni al ili la rimedojn por praktiki higienon. Eduka laboro iras manon en mano kun socia kaj politika laboro. La tero estas dividita, kaj samtempe vintraj lernejoj kaj vesperaj kursoj elkreskiĝas kiel fungoj; klinikoj kaj hospitaloj estas malfermitaj, kaj samtempe milionoj da flugfolioj, afiŝoj kaj pamfletoj klarigas la fundamentajn regulojn de pureco kaj higieno. Kiam la bazoj de socialisma ekonomio—peza industrio, kooperativoj aŭ ŝtataj vendejoj—estas fondataj, la trikontraŭaĵ kaj la kvin-kontraŭaĵ†† movadoj estas komen- citaj por sin-plibonigo en la sama tempo.

Kulturaj palacoj estas plimultiĝantaj tra la lando. Ankaŭ tra la lando, inter la budoj kaj butikoj de

(daŭrigo sur p. 188)

# *Kion Mi Vidis en Koreio*

Claude Roy

Sub la junia suno la ruinoj de Pjongjang etendiĝis tiel malproksimen kiel la okuloj povis vidi. Malgranda korea infano sur la sojlo de kavoj, kie, meze de la ruinoj, lia familio loĝas, rigardis min kun scivolemo miksitaj kun neklara timo.

Mi demandis min mem, kio estas pli netolerebla al la vido kaj la spirito, la horizonto aŭ la rigardo—la terura sceno de dezertigo aŭ la kruela senkulpeco en la okuloj de la knabo? Akra demando turmentis min: Kial? Kial? Kial?

Al tiuj el la Okcidento kiuj ankoraŭ estas skeptikaj pri la terurego de la bakteriologia militado kaj la scenoj de Koreio sanganta, dezertigata kaj detruata, mi sugestis ion por pripensado, kio povas kaj devas forviŝi iliajn dubojn.

Ĉar, eĉ antaŭ la uzado de bakteriologiaj armiloj, la milito kondukata de la usonanoj en Koreio jam longe perdis absolute sian militan karakteron. Ĝi jam ne plu estis klasika milito aŭ moderna milito, kiu penas frapi la militan potencon de la malamiko aŭ ekstermi kaj neŭtraliĝi iliajn armeojn. Ĝi eĉ ne estis tiel nomata "totala milito" dum la Dua Mondmilito, en kiu atakoj estus farataj ne sole kontraŭ la militaj fortoj de la malamiko, sed egale kontraŭ iliaj centroj de industrioj, transportado kaj komunikado.

Ne, la milito lanĉita de la fortoj de la tiel nomataj "Unuigitaj Nacioj" en Koreio depost la komenco de ilia agreso ne estas milito: ĝi estas entrepreno de ekstermado. Nur la germanaj naziistoj kaj la japanaj militaristoj povis elpensi kion faras la tiel nomataj fortoj de "Unuigitaj Nacioj" hodiaŭ en Koreio. Ĉar tio, kio estas efektiva en Koreio hodiaŭ, estas biologia milito. La usonanoj kun fantazia hipokriteco pretekstis "liberigi" la korean popolon. Eĉ el la vidpunkto de Usona propagando, se nur por momento, ni povas vidi ke la milito en Koreio ne sole estas tute ne tolerebla, ĝi ankaŭ estas absolute monstra. Kontraŭ kiuj la Usonaj aeroplanoj, artilerio kaj la Usona soldataro faras militon? Ĉu kontraŭ armeo, registaro, politiko, ekonomia sistemo?

Ne, kontraŭ la popolo.

Ili volas ekstermadi, forviŝi de la tero popolon. Sub la sloganoj de "humanismo" kaj "kontraŭ-komunismo", ili entreprenas metodon paŝo-post-paŝan buĉadon.

Kion Yves Farge kaj mi vidis en Koreio, estas kruelajoj, kiuj superis ĉion kion ni iam ajn vidis dum nia tuta vivo. Mi vivis en francaj urboj reduktitaj al cindroj per la aeroplanoj de Hitler. Mi vojaĝis tra germanaj urboj garnizonataj de la Aliancaj trupoj de Aix-la-Chapelle (Aachen) al Berlino. La tuta mondo scias, kiel la naziistoj ŝanĝis Varsovion en dezerton de ruinoj. Sed ĉio tio malaperas, paliĝas antaŭ Koreio. La usonanoj faris en ĝia reala signifo, en la konkreta senco de la vorto "bruligita tero". Ili koncentrigis sur tiun ĉi landon ĉiujn plej potencajn kaj plej malhumanajn metodojn de ekstermado.

Laŭ antaŭfarita plano, ili metode kaj paŝo-post-paŝe procedis detruon. Ili unue detruis la grandajn urbojn,

poste la malgrandajn kaj finfine la vilaĝojn. Ili unue atakis la soldatojn, poste civilulojn, poste virinojn kaj infanojn. Ili pelis sur la vojon dekojn da milojn da rifuĝintoj minacinte ilin per la atombombo. Tiam, kiam la rifuĝintoj plenigis la vojon kiel rivero de homaro, ili maŝinpafadis la senkulpajn amasojn. Tiuj, kiuj postvivis, estis ĵetataj en internigejojn de malsatigo kaj malrapida morto. La batalantojn, kiujn ili ne sukcesis ŝpruci per napalmbomboj\* sur la batalkampoj, ili amasbuĉas kaj malsatigas sur Koje-insulo, en kampadejoj por militkaptitoj.

Kaj, kiam fajro, ŝtalo, ruzoj kaj amasbuĉado estis farintaj sian rolon, ili kompletigis la taskon per epidemioj disvastigataj inter la postvivantoj.

De Sinidjoŭ al Pjongjang, de la nordo ĝis la centro de Koreio mi estis sufokiĝanta pro doloro kaj honto. Honto, por esti samtempulo de tiaj fikrimuloj. Doloro, por esti atestanto de tia suferado. Mi pensis kun frateco pri miaj kamaradoj en Parizo, enkarcerigitaj, ĉar ili akceptis Ridgway kiel militkrimulo devus esti akceptata, pri la franca popolo en la batalo por vero kaj justeco. Ĉar la vero estas, ke la usonanoj estas buĉistoj en Koreio, ĉar justeco konsistas el tio: senprokraste haltigi tiun ĉi krimagon kaj forpreni la povon de detruo por ĉiam de tiuj, kiuj estas respondecaj.

Sed tiuj ĉi buĉistoj ne estas la venkantoj. Kaj estas tio, kio impresis nin plej profunde dum nia vizito. Ĉar la korea popolo, kvankam atakate de la plej modernaj kaj plej potencaj armiloj en la mondo, suferanta vundon kaj morton, gasatakon, malsatigon, ekstermadon—la korea popolo estas la venkanto. La kamparanoj, kies brutaro estas ŝtelita aŭ detruita, kies kampoj estas ruinigitaj; la laboristoj, kies fabrikoj estas detruitaj, la soldatoj havantaj malpli multajn kaj modernajn armilojn ol la malamiko, estas tiu ĉi malriĉigita popolo, kiu, ĵus liberigita el la japana jugo, komencis konstrui novan landon. Kaj nun ĝi estas haltiganta kaj deviginta forkuri la grandegajn Usonajn militfortojn.

Ĉe la landlimo ĉirkaŭbrakante la lastan korean amikon, kiu akompanis nin, mi sentis, ke mi estis ĉirkaŭprenanta la enkorpiĝon de la plej altaj virtoj, de kiuj popolo povis doni ekzemplon al la mondo: fiero, kuraĝo, nesubigebla energio, racia fido al la potenco de la popolo kaj la grandeco de homo.

Ĉar tiu ĉi malgranda nacio estas potenca popolo. Ili sangas, ili suferas, ili mortas; ili neniam fleksas la genuojn. Mi vidis virinojn farantajn en la rizkampoj la laboron de viro, mi vidis grupojn da laboristoj tage kaj nokte sub bombado ripari fervojojn, pontojn kaj vojojn. Mi vidis meze de ruinoj la preskaŭ nevideblajn enirejojn de subteraj fabrikoj, hospitaloj, lernejoj kaj universitatoj. Sub la grundo en labirintoj fositaj profunde en la tero, kreita per ŝarĝo de dinamito kaj multimemo en kelkaj semajnoj, la fabrikado de armiloj daŭras, la vunditoj estas prizorgataj, brulvundoj de civiluloj ŝprucitaj per napalmbomboj estas bandaĝitaj, la instruado de infanoj daŭras. Vivo super la grundo ankoraŭ daŭras. La transportoj iras al la fronto malgraŭ la furiozo de la bombaeroplanoj. En la subteraj

laborejoj de la Pjongjanga Muzeo rabita kaj poste bruligita de la usonanoj ni vidis koreajn arkeologojn laborantajn super la fresko-reliefo de la periodo de Ko Koŭ Ria antaŭ nelonge elterigita el nordkorea tombo. En valo, sub arboj mi vidis kampanion da koreaj soldatoj post sia militekzercado organizi legrondon, kaj tiuj, kiuj scipovas legi, instruis la alfabeton al siaj malkleraj kamaradoj. Ne, la korea popolo ne estas konkerita. Sed la buĉistoj de Ridgway estas malhonorigitaj.

Ili estas malhonorigitaj. Kaj ili estas solaj. La flago de la "Unuigitaj Nacioj" estas preteksto. Plenmano da dungitaĉuloj el tri aŭ kvar landoj ne formas unuigon de nacioj. Sed en la koro de la Demokrata Popola Respubliko de Koreio batas la vivanta koro de ĉiuj popoloj de la mondo. La Ĉinaj Volontuloj, facilmovaj kaj malpezaj kiel atletoj, estas ĉe la flanko de siaj koreaj fratoj. Mi admiras iliajn kuraĝon kaj disciplinon. Kiel armeo ili donas la impreson, ke ili estas efektive batalsperta armeo kun komuna volo, inteligenta kaj efika. Mi opinias, ke la volontuloj de 1792, la volontuloj de la granda Franca Revolucio, devis havi multe da trajtoj komune kun tiu ĉi armeo.

Elvokante rememoraĵojn pri nia vizito mi rememoras la finon de tago proksime de Pjongjang. Ni estis kune, kelkaj amikoj en komandejo kaŝita en la

arbaro. Estis juna ĉina volontulo, studento de literaturo, kiu studis ses jarojn en Ŝanhajo. Estis hungara doktoro, kiu venis kiel volontulo por zorgi pri la vunditoj en unu el la ambulancoj kontribuitaj al Koreio de la hungara popolo. Estis duondekduo da koreaj oficiroj kaj soldatoj. Estis Sovetia ĵurnalisto, juna pola ĥirurgo, specialisto en plastika ĥirurgio, kiu pasigis siajn tagojn kaj noktojn por provi fermigi denove la palpebrojn de tiuj difektitaj per napalmo. Estis ĉina bakteriologo, kiu kune kun siaj koreaj fratoj estas batalanta kontraŭ la Usona plago. Estis ankaŭ juna rumana diplomato kaj franca verkisto, mi mem.

Ni parolis pri la milito, ĝiaj teruregoj kaj la estonteco. Kaj unu el ni mallaŭte komencis kanti la Internacion. Ĉiuj aliaj kunigis siajn voĉojn al la lia. La koreanoj kantis koree, la ĉinoj ĉine, la hungaro hungare, la sovetiano ruse, la rumano kaj polo en siaj lingvoj kaj mi france. La vortoj ne sonis same, sed la melodio kaj la signifo estis unu.

Mi aŭdis grandegajn amasojn bele kanti la Internacion. Tamen, neniam mi estis tiel kortuŝita kiel per tio ĉi, la Internacio en Pjongjang, tiu ĉi himno de espero kantita mallaŭte de homoj ĉieaj meze de ruinoj....

Trad. K. Maier.

\* *Gasolenbombo*

## La Ĉina Popolo Subtenas la Rezoluciojn de la Monda Packonsilo

La Komitato de Ĉina Popolo por Defendo de Mondpaco kaj kontraŭ Usona Agreso publikis deklaron subtenante la rezoluciojn faritajn de la Speciala Kunsido de la Monda Packonsilo. La deklaro legiĝas:

La Speciala Kunsido de Monda Packonsilo kiu okazis de la 1-a ĝis la 6-a de julio en Berlino aprobis la "Mesaĝon al la Registaroj de la Kvar Potencoj kaj la Popoloj Tutmondaj pri la Germana Problemo", la "Rezolucion pri la Batalo kontraŭ la Remilitarigo de Japanio kaj por Demokratia Japanio", la "Rezolucion pri la Problemo Haltigi la Korean Militon", kaj la "Deklaracion pri Okazigo de Packongreso de Tutmondaj Popoloj". Tiujn ĉi rezoluciojn kaj deklariojn la ĉina popolo opinias tute konformaj al la volo de la pacamaj popoloj de Ĉinio kaj la tuta mondo. La ĉina popolo ilin varme subtenas kaj volonte batalas por ilia realigo.

Nuntempe la plej elstaraj problemoj en la monda situacio estas la problemoj de Koreio, Japanio kaj Germanio. La ĉefaj paŝoj de la Usonaj agresantoj por prepari la entreprenon de nova mondmilito estas: en Ekstrema Oriento barbare agresi Koreion kaj remilitarigi Japanion okupatan de Usono; kaj en Eŭropo remilitarigi Okcidentan Germanion okupatan de Usono kaj organizi "Eŭropan Armeon" kies koro estas la armeo de Okcidenta Germanio. Rezulte de tiuj krimaj paŝoj faritaj de la Usonaj agresantoj, la monda situacio pli kaj pli streĉiĝas kaj malboniĝas, kaj la mondopaco estas jam grave minacata. Pro tio, la plej urĝa tasko antaŭ la tutmondaj popoloj estas batali por la haltigo de la korea milito, kontraŭ la remilitarigo de Japanio kaj por la paca solvo de la germana problemo. Nur kiam tiuj ĉi celoj estas unue atingitaj, la konservo kaj firmigo de mondopaco ebligis.

La rekta minaco al la mondopaco estas la korea milito kaŭzita de la Usona agreso. Tial, haltigi la

militon kaj restarigi pacon en Koreio estas la plej urĝa tasko por paco en la nuna tempo. La intertraktado pri armistico en Koreio daŭras jam pli ol unu jaron, sed pro la senracia malhelpado kaj prokrastado de la Usona flanko, fina interkonsento ĝis nun ankoraŭ ne estiĝis. La Usonaj agresantoj nun unuflanke daŭrigas prokrasti kaj malsukcesigi la armistitan intertraktadon kaj aliflanke faras kontraŭ la ĉina kaj korea popoloj sinsekvon da senraciaj provokaj agoj. Post sia entrepreno de kontraŭhumaneca kaj internacian konvencion malobservanta bakteria milito kontraŭ la ĉina kaj korea popoloj, la Usonaj agresantoj lasttempe eĉ barbare bombadis la korean pacan urbon Pjongjang kaj la Elektrostacion ĉe Jalu-rivero intime kunligitan kun la paca vivo de la ĉina kaj korea popoloj, kaj atakis per aeroplanoj la Nordorienton de nia lando kaj pafe mortigis kaj vundis niajn pacajn loĝantojn. Tiuj ĉi senraciaj provokaj agoj de la Usonaj agresantoj jam pli seriozigis la situacion en la Ekstrema Oriento. Tio pruvas ke la Usona registaro intencas malsukcesigi la armistitan intertraktadon kaj etendi la agresmiliton por minaci la pacon en la Ekstrema Oriento kaj en Azio.

En tiu ĉi situacio, por haltigi la militon en Koreio kaj solvi juste kaj pace la korean problemon, la tutmondaj pacamaj popoloj, unue la popoloj de Ĉinio kaj Koreio, evidente ankoraŭ devas pene batali. Pro tio antaŭ ni ĉina popolo la plej grava tasko estas subteni per pli granda forto la justan bataladon de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj por devigi la Usonajn agresantojn rapide akcepti justan pacon. Ni kredas ke dank' al la persista penado de la ĉina kaj korea popoloj kaj al la unuiginta forto de la pacamaj popoloj tra la tuta mondo, ni certe gajnos la finan venkon en la pobatalado kaj defendo de paco.

# La Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo Finkonstruita

Je la memorinda tago, la unua de julio, la 31-a datreveno de la Komunista Partio de Ĉinio, trajno portanta fervoj-konstruistojn, labormodelojn kaj junajn pionirojn ekveturis de Ĉungking al Ĉengtu, je 10:30 antaŭtagmeze, en tondro de aplaŭdoj. Samtempe en Ĉengtu 30.000 popolanoj plenigis la placon antaŭ la fervoja stacio por adiaŭi al la florornamita trajno ekmoviĝanta je sia virga veturo al Ĉungking. Estis granda festotago por la popolanoj de Seĉuan. Tio markis la realiĝon de 40-jara sonĝo pri moderna fervojo por la regiono.

Tiu ĉi nova ekonomia arterio de Seĉuan-regiono longas 505 kilometrojn interligante la urbojn Ĉengtu kaj Ĉungking tra 8 gubernioj, kaj pli ol 50 urbetoj kaj vilaĝoj. Tio ne nur reduktas la tempon de vojaĝdaŭro inter Ĉengtu kaj Ĉungking, sed konektite kun la navigacio de Jangze-rivero metas la Sudokcidentan Regionon en pli intiman kaj plirapidan interrilaton kun aliaj grandaj administraj regionoj de Ĉinio. Nun bela perspektivo prezentiĝas antaŭ la popolo de la Sudokcidento. La Seĉuan-a baseno, kiun la fervojo servas, kun 12 milionoj da popolanoj estas konata pro siaj abundaj naturaj riĉaĵoj. La okcidenta sekcio de la fervojo trairas Ĉengtu-ebenon, la grajnejo de la Sudokcidento. Poste ĝi trairas la areon faman pro sia tabako, vendata fore ĝis Ŝanhajo kaj Kantono. Nejkiang, centropunkto de la fervojo produktas 70-80% de la tuta produktokvanto de sukerkano en la tuta Sudokcidento. Ankaŭ fama salofonto troviĝas ĉe Zeliuzing, 45 kilometrojn sudokcidente de Nejkiang, kiu liveras pli ol duonon de la salo konsumata en la Sudokcidento. La orienta sekcio de la fervojo trairas Lungĉang, Ĵungĉang, Ĵungĉuan kaj Kiangzin, la hejmlokoj de delikataj oranĝoj kaj tangerinoj,\* tiel same kiel konata lintolo populara tra la tuta lando por somera vestaĵo. La ĉirkaŭaĵo de Ĵungĉuan produktas ĉiujare du milion tunojn da karbo. Ĉungking, la finiĝo de la fervojo estas centro de peza industrio, kie la ŝtalreloj kaj

partoj de instalaĵoj bezonitaj en konstruo de la fervojo estis fabrikitaj. Aliaj produktaĵoj de la regiono, kiel kanabo, porkharegoj, porkoj, kotono, aleŭritaĵ oleo, silko, vino kaj medicinaj herboj, ĉiuj estas famaj tra la lando.

Antaŭ ol la nova fervojo konstruiĝis, la mizera nesufiĉeco de transportiloj rimarkeble kontrastis kun la riĉeco de la regiono. La kosto de transporto eĉ por tre mallonga distanco malhelpis interŝanĝon de multaj produktaĵoj. Ekzemple, karbo de Ĵungĉuan, estis kvinoble pli kara ol ĉe la minejo mem, kiam ĝi atingis Ĉengtu-an merkaton. La ekscesa prezo de karbo malhelpis la industriigon de Ĉengtu, kie estis eĉ pli mal-kare uzi fajrlignon kiel kuiran hejtajon.

La malfacileco de transportado ankaŭ influis agrikulturan produkton. En Nejkiang-Zeĉung-regiono, pro manko de manĝaĵo, la plantareo de sukerkano malgrandiĝis je pli ol triono en 1941. Tamen ĉe Ĉengtu kaj Tazu, kvarono ĝis triono de la jara rikoltajo estis nevendebla superfluaĵo.


Interkomunikado kun aliaj partoj de la lando estis eĉ pli malfacila. Industriaj produktaĵoj de Ŝanhajo devis rondiri tra Nordokcidenta Ĉinio por atingi Ĉengtuon. Tial transporta malfacilo ege malhelpis la normalan interfluadon de komercaĵoj inter la Sudokcidento kaj aliaj provincoj.

## Fervoja Vivlinio de Seĉuan

Jen la kaŭzo kial en estintaj 40 jaroj la Seĉuananoj tiel fervore urĝigis kaj prisonĝis konstruadon de fervojo, vivlinio, por la disvolvado de ilia natura riĉfonto, kompreneble, nenio realiĝis kaj, ĝis la tago de liberigo, eĉ ne sola relo estis metita.

Tuj kiam la Sudokcidento estis liberigita la Popola Registaro tamen komencis trovi rimedojn por plenumi la Bezonon de la popolo. Fine, kiam estis anoncote ke la fervojo estos konstruata de la ĉina popolo mem, per hejme faritaj materialoj, ne malmultaj personoj estis skeptikaj. Ĉar en la tuta historio de fervoja konstruado en Ĉinio, la necesaj kapitalo, tekniko, materialo ĝis plej malgrandaj bagateloj, ĉio devis esti importata el eksterlando. Tiu dubo tamen rapide forbalaigis de la plej elokventa el la argumentoj—la fakto.

La fervojo estis ekkonstruita je la 15-a de junio, 1950 kaj kompletigita je la 13-a de junio, 1952, ekzakte post du jaroj. Ĉinkaŭ 25.000 anoj de la Popola Liberiga Armeo antaŭiris por konstrui la vojfundamenton. Ili bataladis ĉe la konstrua fronto tiel heroe kiel sur la batalejo dum la Liberiga Milito. En novembro, 1950,



30,000 popolanoj bonvenigas la unuan vagonaron ĉe la Ĉengtua stacio.

100,000 emancipitaj kamparanoj transprenis la taskon de ili. Komprenante ke la fervojo estas konstruata por ilia propra nuntempa kaj venonta profito, la kamparano-konstruantoj laboris kun granda entuziasmo. Ili rapide adoptis la spertojn de siaj antaŭuloj kaj aldone, prezentis multe da raciigaj proponoj, kiuj ege altigis la efikecon. Multaj el ili fariĝis lertaj fervoj-konstruantoj.

Laboristoj en la Sudokcidento kontribuis per antaŭdata liverado de ĉiuj mendoj por ŝtalreloj, instrumentoj kaj iloj.

La konstruantoj de la fervojo estis subtenataj de la tuta lando. Miloj da tunoj da konstruaj materialoj kaj ekipaĵoj, inkluzive de lokomotivoj, ponto-spanoj\*\* kaj ŝtalajoj enfluadis en Seĉuan-on, de Nordokcidenta, Norda, Orienta kaj Centrasuda Ĉinio. Vojkonservaj laboristoj el Ŝanhajo kaj Zinan ne nur helpis meti la vojkonservan laboron de la nova fervojo sur firman bazon, sed ankaŭ trejni centojn da novaj lertaj vojkonservaj laboristoj por la tasko. Laboristoj tra la tuta lando sekvadas la antaŭeniradon de la konstruado de la fervojo kun varma intereso. Ili helpis je ĉia ŝanco por garanti la plej altan kvaliton de la produktaĵoj por la fervojo. La transportistoj volonte malaltigis la koston, kaj ĉiam unue transportis la materialojn por la fervojo.

Ĉi tiu amasa subteno garantiis, ke la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo plene konformas al la ekzakta teknika normo de popola fervojo. La Kuomintanga plano postulis "mallarĝrelan linion" sed eĉ sur papero troviĝis multaj malakordajoj. La nuna Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo estas desegnita laŭ la normo kaj bezono specifita de la Ministerio de Fervojo de la Centra Popola Registaro. La vojfundamento estas konsiderinde larĝigita ol la origine planita. Kurboj kaj deklivoj estis plibonigitaj dum aktuala konstruado reduktante la tutan longon de 530 kilometroj al 505. Progresintaj Sovetiaj konstrumetodoj estis adoptitaj kaj tiuj ne malmulte kontribuis al la alta kvalito de la fervojo, precipe en desegnado de reloj, konstruado de vojfundamento kaj multaj pontoj.

Tiu ĉi fervojo ne nur kreis rekordon en rapideco de konstruado sed ankaŭ estas la plej solide kaj bone konstruita en la tuta lando. Plie, ĝi estas la unua fervojo konstruita de la ĉina popolo tute per siaj propraj manoj el siaj propraj materialoj. Tio ĉi estas speciale fierinda por la popolo.

Tra la tuta lando, venadis al la redakcejoj de ĵurnaloj multaj leteroj kiuj esprimis koran dankon al la Ĉina Komunista Partio, gvidata de Prezidanto Maŭ, la organizanto kaj inspiranto de la konstruado de la fervojo. La fakto, ke nur en du kaj duona jaroj post la liberigo de Seĉuan, la Popola Registaro plenumis taskon kiun ne povis la pasintaj reĝimoj, parolas elokvente pri la supereco de la sistemo de popola demokratio.

### Fervojo de Popolo

La Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo estas fervojo de la popolo mem. De la tago kiam la konstruado komenciĝis, ĝi alportis freŝan ĝojon al la sudokcidentanoj. Mendoj de konstruaj materialoj por la fervojo, revivigis pli ol 400 ŝtal- kaj maŝin-manufakturojn en Ĉungking. Aliaj industrioj, ekzemple tiuj de cemento, konstruado, briko, tegolo, lignosegado, kemiaj kaj elektraj instalaĵoj, ankaŭ estis restarigitaj kaj disvolvigitaj.

Kiam la fervojo funkciigis sekcion post sekcio, urboj apud la linio ekĝuis senprecedencan prosperon.

Ekzemple, Jungĉuan ekhavis tute novan aspekton. Novaj konstruaĵoj ĉirkaŭ la fervoja stacio stariĝis kaj multaj novaj industriaj kaj komercaj entreprenoj ekfunkciis por kontentigi la rapide vastiĝantan merkaton. Ĝi fariĝis grava kolektejo de grenoj de kamparo por transsendi al Ĉungking kaj aliaj urbegoj.

Je la malfermo de la nova fervojo, estas taksite ke pli ol 1,200 specoj da lokaj produktaĵoj de la Sudokcidento, inkluzive de specialaj produktaĵoj de Sikang kaj Tibeto, kiel lano de Tibeta bovo kaj medicinaj herboj kiuj estis neakireblaj en pasinteco en aliaj areoj nun povas esti transsendataj per ŝipo al Orienta, Norda, kaj Centra-suda Ĉinio grandkvante. Ekzemple, nun kanabo povas esti transportata per trajno de Ĉengtu al Ĉungking je nur ĉirkaŭ 6 procentoj de la antaŭa transporta kosto per veturilo. Tio ĉi nemezureble pliiĝas la vendeblecon de la produktaĵoj en malproksima merkato.

Interregionaj diferencoj de prezoj jam estas rapide reduktitaj bonefikante al produkto ĝenerale. La plantareo de sukerkano en Neĵkiang en 1951 pliiĝis je 36 procentoj ol en 1950, kaj sukerprodukto en ĉi jaro espereble atingos la novan altecon de 200,000 tunoj. Lin-teksaĵo en Lungĉang pliiĝis je 120 procentoj ol en pasinta jaro kaj tabakoprodukto en Ĉengtu-areo pliiĝis ĉirkaŭ kvaroble ol tiu en 1951.

Grandioza kaj profitiga kia ĝi estas, la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo estas nur la komenco. En venontaj jaroj, la Tienŝui-Ĉengtu-a linio, kiun oni jam komencis konstrui, estos konstruita, kaj ĝi interligos la Sudokcidenton kun la Nordokcidento kaj la ceteraj regionoj de Ĉinio. Je kompletigo de aliaj linioj en Sudokcidento, en proksima estonteco la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo tiam fariĝos integra parto de la tutlanda fervoj-reto.

Verkis Ĉaŭ Ĉing-ŝjueh, tradukis Nash

\* *citrus nobilis*

† *aleurites cordata*

\*\* ĉiu parto de ponto inter kolonoj

## Agnosko de Internaciaj Konvencioj por Paco kaj Humaneco

La 13an de julio, Ĉou En-laj, ministro por fremdlandaj aferoj, faris en la nomo de la Centra Popola Registaro de Ĉinio du gravajn deklaraĵojn por agnoski respektive "La Konvencion por Plibonigi la Staton de Vunditoj kaj Malsanuloj de Armitaj Fortoj en la Batalejo", "La Konvencion por Plibonigi la Staton de Vunditoj, Malsanuloj kaj Fuĝintoj el Rompitaj Ŝipoj de Surmaraj Armitaj Fortoj," "La Konvencion pri Traktado de Militkaptitoj" kaj "La Konvencion pri Protektado de Civiluloj dum Milittempo", ĉiujn subskribitajn je la 12a de aŭgusto, 1949 ĉe Ĝenevo, kaj la "Protokolon pri Malpermeso de Apliko de Venengaso kaj Similaj Venenaĵoj kaj Bakterioj en Milito", faritan je la 7a de aŭgusto, 1925 ĉe Ĝenevo. La deklaraĵoj diras, ke la supremenciitaj konvencioj kaj protokolo estas favoraj al internacia longdaŭra paco kaj bazitaj sur humanismo, kaj sekve la Centra Popola Registaro ilin agnoskas.

# Agrara Reformo Efektivigis en Plej Granda Parto de Ĉinio

Ĉi-jare la 30-a de junio estas la dua datreveno de la tago kiam la Centra Popola Registaro publikigis la Leĝon de Agrara Reformo de la Ĉina Popola Respubliko. En la pasintaj du jaroj arda kaj grandioza movado de agrara reformo disvolvigis unu post la alia tra la vastaj malpli frue liberigitaj regionoj de la lando, kaj akiris tre grandan sukceson. Ĝis nun, en plejgranda parto de regionoj de Ĉinio agrara reformo jam efektiviĝis. En la agrikulturaj areoj de Nordorienta Ĉinio kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kiuj estis pli frue liberigitaj, agrara reformo jam efektiviĝis antaŭ la publikiĝo de la Leĝo de Agrara Reformo. La tuta Nordĉinio ankaŭ plenumis agraran reformon escepte la areojn kun 200 mil kamparanaj loĝantoj en parto de Sujjuan-provinco. En Nordokcidenta Ĉinio agrara reformo efektiviĝis en la areoj kun 85% de la kamparana loĝantaro de la tuta regiono. En Centrasuda Ĉinio agrara reformo efektiviĝis en la areoj kun 81% de la kamparana loĝantaro de la tuta regiono. En Sudokcidenta Ĉinio agrara reformo efektiviĝis en la partoj kun 81% de la tutregiona loĝantaro, kaj en Orienta Ĉinio agrara reformo efektiviĝis en la areoj kun pli ol 90% de la kamparana loĝantaro de la tuta regiono. En ĉiuj supre diritaj regionoj kie efektiviĝis agrara reformo, la feŭda agrara sistemo estas radikale renversita, kaj sekve liberigis la produkta povo de la vasta kamparanaro, kio kreis fundamentajn kondiĉojn por la industriigo de nia lando. Post la movado de agrara reformo, senprecedence alte levigis la politika konscio kaj produkta entuziasmo de la vasta kamparanaro kiu nun estas disvolvanta grandskalan patriotisman konkursan movadon de pliprodukto laborante por sia propra bonvivo kaj la konstruado de la patrolando. La tuta kamparo jam tute nove aspektas. La ĉefaj regionoj, kie agrara reformo ankoraŭ ne komenciĝis aŭ ne tute efektiviĝis, estas de minoritatoj, paŝtejoj kaj malgrandaj partoj de la provincoj Kansu, Junnan, Kuejĉoŭ, Kuangtung, Kuangsi kaj en la 62 gubernioj de la agrikulturaj areoj de Sinkiang-provinco. Agrara reformo estos sub zorgema direkto laŭpaŝe enkondukata en tiujn regionojn escepte la regionojn de paŝtejoj. Jenaj estas la atingoj kaj statoj de agrara reformo en la diversaj regionoj:

En Norda Ĉinio: En plejgranda parto de la regiono agrara reformo estis efektiviĝinta jam antaŭ la publikiĝo de la Leĝo de Agrara Reformo. La partoj kie plej laste efektiviĝis agrara reformo estas Sujjuan-provinco kie la movado de agrara reformo komenciĝis en la pasintjara vintro kaj fundamente finiĝis antaŭ la printempa plugado ĉi-jare. En la movado de agrara reformo pli ol 1,300,000 kamparanoj al kiuj tero mankis aŭ ne sufiĉis kaj aliaj laborantaj popolanoj de Sujjuan-provinco ricevis pli ol 11,328,000 muojn (1 muo=6.67 aroj) da tero, pli ol 65,000 ŝarĝbrutojn, pli ol 61,860,000 ĝinojn (1 ĝino= $\frac{1}{2}$  kg.) da grenoj kaj pli ol 277,000 agrikulturajn instrumentojn. Nun agrara reformo jam efektiviĝis en la regionoj kun 2,400,000 kamparanaj loĝantoj en la provinco kiu enhavas entute 2,600,000 kamparanajn loĝantojn. La cetera parto kun 200 mil kamparanaj loĝantoj, kie agrara reformo ankoraŭ ne efektiviĝis, estas ĉefe Ĥoĉaŭ-ĉuhla kaj Ulanĉap-ĉuhla, kie agrara reformo estos efektiviĝinta en julio-aŭgusto de la kuranta jaro.

En Nordokcidenta Ĉinio: Escepte Sinkiang-provincon, ĝis la fino de majo agrara reformo jam fundamente efektiviĝis en la agrikulturaj areoj de la provincoj Ŝensi, Kansu, Ningŝia kaj Ĉinghaj kaj Si-an-municipalo. En tiuj ĉi regionoj estas entute pli ol 24,600,000 kamparanaj loĝantoj, 85% de la 29-miliona kamparana loĝantaro en Nordokcidenta Regiono. Inter ili la partoj kie efektiviĝis agrara reformo de la pasintjara vintro ĝis ĉi-jara printempo enhavas 114 guberniojn kaj municipojn kaj pli ol 15 milion kamparanajn loĝantojn. Entute 7,500,000 kamparanoj al kiuj tero mankis aŭ ne sufiĉis, ricevis pli ol 16,000,000 muojn da tero. Se ni enkalkulas krom la tero ankaŭ aliajn havaĵojn distribuitajn al la kamparanoj, do 11 milion kamparanoj ĝuis bonon el la agrara reformo. De la vintro de 1950 ĝis la printempo de 1951 plenumiĝis agrara reformo en areoj kun pli ol 8 milion loĝantoj. En la malnova liberigita regiono de Ŝensi, Kansu kaj Ningŝia kun pli ol 1,600,000 loĝantoj kaj en la duonmalnova liberigita regiono de Ŝensi-provinco kun 200 mil loĝantoj agrara reformo jam efektiviĝis antaŭ la publikiĝo de la Leĝo de Agrara Reformo. Nun ankoraŭ ne plenumiĝis agrara reformo en areoj kun pli ol 4,600,000 loĝantoj.

En Orienta Ĉinio: Nur en 30 vilaĝoj de kelkaj insuloj apud Fukien- kaj Ĉekiang-provincoj kaj en 34 vilaĝoj apud Huaĵ-rivero en norda Anhuej-regiono agrara reformo ankoraŭ ne komenciĝis. La ceteraj partoj plenumis agraran reformon, kaj teratestilojn jam ricevis la kamparanoj en pli ol 40 mil vilaĝoj—93% el la vilaĝaro de tiu ĉi regiono. En 2,753 vilaĝoj de Fukien-provinco kaj 325 vilaĝoj de norda Anhuej, la laboroj de agrara reformo fundamente finiĝos en junio-julio. Antaŭ la printempa plugado en la pasinta jaro pli ol 80% el la vilaĝaro de Orienta Ĉinio jam plenumis agraran reformon. En la pasinta jaro, agrara reformo iris en la fiŝkaptaj kaj salkampaj regionoj kaj parto de montregionoj apud la maro en Ĉekiang- kaj Fukien-provincoj kaj en la pasinttempe inunditaj regionoj de norda Anhuej, Ŝantung kaj norda Kiangsu, kie estis faritaj de la somero de 1951 sinsekve multfojaj esploroj pri la tipoj kaj poste praktikado por krei spertojn; kaj kie la provincaj kaj distriktaj popolaj registaroj publikigis unu post la alia politikojn kaj instrukciojn pri agrara reformo en arbara, fiŝkapta kaj salkampa areoj kiuj estas malsamaj ol la ordinaraj areoj. Tiel, kvankam en tiuj areoj la cirkonstancoj estis pli kompleksaj kaj la laborbazoj estis malfortaj en la pasinteco, tamen pro la respondeca gvido de la provincaj kaj distriktaj gvidinstitucioj kaj pro la sufiĉa preparado de la kadroj kaj popolamasoj, la movado de agrara reformo glate progresis kaj sufiĉe normalaj estis la plenumo de politikoj kaj mobilizo de popolamasoj, sekve fine de majo ĉi-jare agrara reformo jam fundamente efektiviĝis. Nun en Orienta Ĉinio plenumis agraran reformon areoj kun pli ol 100 milion loĝantoj. En la granda movado de agrara reformo en tiu ĉi regiono 110 milion muoj da agroj de bienuloj kaj riĉaj kamparanoj estis konfiskitaj aŭ rekviziitaj kaj distribuitaj al pli ol 60 milion kamparanoj al kiuj tero mankis aŭ ne sufiĉis.

En Centrasuda Ĉinio: La movado de agrara reformo komenciĝis en la vintro de 1949 en la plifrua



liberigita Honan-provinco, kaj disvolviĝis tra la tuta regiono post kiam la Centra Popola Registaro publikigis la Leĝon de Agrara Reformo. Ĝis nun, el la areoj kun pli ol 146 milion kamparanaj loĝantoj en 513 gubernioj de la 6 provincoj en tiu ĉi regiono kaj en la ĉirkaŭurboj de Uhan, Kanton kaj aliaj municipoj jam plenumis agraran reformon areoj kun 118,750,000 kamparanaj loĝantoj. Agrara reformo jam fundamente efektiviĝis en la provincoj Honan, Hupej, Hunan kaj Kiangsi, kaj ankaŭ efektiviĝis en pli ol triono kaj du trionoj respektive de la provincoj Kuantung kaj Kuangsi. En tiu ĉi regiono la kamparanoj al kiuj tero mankis aŭ ne sufiĉis, ricevis de la bienuloj pli ol 130 milion muojn da tero. Nun escepte la areojn kun pli ol 10 milion loĝantoj en la provincoj Kuantung kaj Kuangsi kie oni rapidas fari agraran reformon kaj postreformajn kontrolajn laborojn profitante la paŭzon inter multokupaj agrikulturaj sezonoj (tie la agrikulturaj sezonoj malsamas ol alilokaj), la partoj plenumintaj agraran reformon en Centrasuda Ĉinio enhavas 81% de la kamparana loĝantaro de la tuta regiono. Sed la areoj kontrolitaj post agrara reformo nur estas iom pli ol 40% de la areoj plenumintaj agraran reformon. Laŭ antaŭkalkulo, antaŭ la venonta printempa plugado agrara reformo efektiviĝos kaj la kontrolaj laboroj plenumiĝos en la tuta regiono.

En Sudokcidenta Ĉinio: En la pasintaj du jaroj post kiam la Centra Popola Registaro publikigis la Leĝon de Agrara Reformo, la areoj kie agrara reformo komenciĝis, ampleksas 12,477 vilaĝojn kun ĉirkaŭ 73,590,000 loĝantoj—ĉirkaŭ 81% de la loĝantaro de Sudokcidenta Ĉinio—en 260 gubernioj de Seĉuan-regiono, kaj la provincoj Junnan, Kuejĉoŭ kaj Sikang kaj en la ĉirkaŭurboj de 10 municipoj. Nun escepte de la areoj loĝataj de minoritatoj kaj malgrandaj partoj de Junnan- kaj Kuejĉoŭ-provincoj, agrara reformo jam fundamente efektiviĝis en Sudokcidenta Ĉinio. En tiuj areoj plenumintaj agraran reformon 80% de la tero transiris de bienuloj al malriĉaj kamparanoj, kamparanaj laboristoj kaj parto de mezkamparanoj, kiuj havis malmultan teron. En la areoj ankoraŭ ne plenumintaj agraran reformon en Junnan- kaj Kuejĉoŭ-provincoj, agrara reformo komenciĝos en la ĉijara vintro kaj la printempo de la venonta jaro.

En la regionoj plenumintaj agraran reformon, la aspekto de la kamparo rapide ŝanĝiĝas. Alte leviĝis la produkta aktiveco de la vasta kamparano ricevinta teron kaj aliajn materialojn por produktadokaj vivo. Jen la ĝeneralaj fenomenoj: Ĉi-jare la kamparanoj pli frue komencis la printempan plugadon, multe sterkis kaj kun granda energio sin okupis en fosado de irigaciaj kanaletoj kaj putoj, kaj en malebligado de kaj batalo kontraŭ trosekeco; ili multe aĉetas modernajn agrikulturajn instrumentojn, uzas bonspecajn semojn kaj plibonigas la teknikon de kulturado. En la regionoj minacataj de trosekeco kaj insekta damaĝo, la kamparanoj ĝenerale disvolvis senprecedence movadon kontraŭ la plagoj. Post la efektiviĝo de agrara reformo la kamparanoj de la 7 gubernioj de orienta Kining en Sujĵuan-provinco nove fosis pli ol mil irigaciajn kanaletojn kaj multajn putojn, kaj tiel plivastigis la irigaciatan areon je pli ol 400 mil muoj. En la Sudokcidenta Ĉinio dum la printempa trosekeco ĉi-jare, 12 milion kamparanoj organiziĝis kaj en mallonga tempo jam venkis la minacon de trosekeco; diverslokaj kamparanoj grandamase aliĝas al laborinterhelpaj grupoj kaj varme partoprenas la patriotisman movadon de pliprodukto.

En Centrasuda Ĉinio nun estas pli ol milion interhelpaj grupaj partoprenitaj de pli ol 5 milion kamparanaj familioj. 15 mil interhelpaj grupoj kaj pli ol 84 mil individuaj kamparanoj de Kiangsi-provinco en Centrasuda Ĉinio partoprenis la konkurson por abundprodukto de po mil ĝinoj da rizgreno en ĉiu muo da rizkampo, kiun konkurson partoprenis ankaŭ pli ol 200 mil kamparanaj familioj de Hunan-provinco. En Sudokcidenta Ĉinio la nombro de labor-interhelpaj grupoj jam multiĝis ĝis 500 mil. En Nordokcidenta Ĉinio la interhelpa kaj koopera movado de agrikultura produktado multe disvolviĝis en la regionoj ĵus plenumintaj agraran reformon, i.a. organiziĝis jam 80% de la laborforto en la vilaĝoj de la administraj subregionoj Tingsi, Tienŝuj, k.a. en Kansu-provinco kaj de la gubernioj Minho, Lotu, k.a. en Ĉinghaj-provinco. Post la agrara reformo la patriotisma konkursa movado de pliprodukto ankaŭ vigle disvolviĝas en la vilaĝoj de Nordokcidenta Ĉinio. Multaj kamparanoj levis la devizon: "Penu en produkto, por danki Prezidanton Maŭ!"

La movado de agrara reformo altege levis la revolucionan aktivecon de la kamparanaj amasoj, kaj sekve firmigis la popoldemokratian diktatorecon en la kamparo. Post la movado de agrara reformo la organizoj de diverslokaj kamparanaj asocioj multe disvolviĝis. En Sujĵuan-provinco de Norda Ĉinio la membraro de la kamparanaj asociaj grandigis de pli ol 700 mil personoj antaŭ la agrara reformo ĝis pli ol 1,049,000 personoj nun. En Nordokcidenta Ĉinio la membraro de la kamparanaj asocioj jam atingis 30-40% de la nombro de la tutregiona loĝantaro. En Centrasuda Ĉinio la kamparanaj asocioj nombras pli ol 40 milion membroj, kaj en Sudokcidenta Ĉinio 33,300,000 membroj. En la vasta kamparo de la supre menciitaj regionoj plenumintaj agraran reformon la organizoj de la Novdemokratia Junula Ligo de Ĉinio—progresinta organizo de novĉiniaj junuloj— kaj la Demokrata Virina Asocio ankaŭ multe disvolviĝis. Samtempe amasegoj da aktivuloj aperis kaj estas elektitaj en la diversrangajn popolajn registarojn de vilaĝoj por rekte partopreni la ŝtatajn administrajn laborojn.

J. Plinov



Ankaŭ la liberigitaj kamparaninoj nun fervore legadas ĵurnalojn.

# La Malnova kaj Nova Hejmoj de Ĉu Jung-kang, Laboristo de la Lanaĵo-fabriko Jingfeng

Apud la rivertransirejo ĉe la kruciĝo de Norda Suĉoŭ-strato kaj Mokanŝan-strato laŭlonge de la Suĉoŭ-rivereto, estas iu surgrundigita difektita hejmboto en kiu loĝis la familio de Ĉu Jung-kang, unu el la hejtistoj en la kaldronego-ĉambro de la Lanaĵo-Fabriko Jingfeng en Ŝanhajo. Li komencis sian metioleradon kiam li havis la aĝon de 13 jaroj kaj jam laboradis por la pasintaj 21 jaroj.

La lia estas familio el 7 membroj. La patro de Ĉu estas nun 72-jara kaj estis laboristo en la sama fabriko ĝis antaŭ unu jaro. Ĉu mem havas nun la aĝon de 34, kaj jam laboris en la fabriko por 14 jaroj, kaj ankaŭ lia edzino faras ion por la fabriko. Ili havas nun 4 infanojn.

Ĉi tiu estas unu el la laboristaj familioj al kiuj estas distribuitaj laboristaj loĝejoj en Caŭĵang Vilaĝo.

Al Ĉu kaj lia tuta familio, tiu ĉi okazaĵo ja estas nerevita favoraĵo.

Sub la regado de la japanaj kaj Kuomintangaj reakciuloj, malgraŭ tio ke tri el ili laboris penegge por la fabriko, tamen ili vivis mizere kaj malespere. Ili eĉ ne havis sufiĉan monon por aĉeti rizon. Kiam ajn iliaj infanoj malsaniĝis, ili nur povis ilin lasi al hazardo. Por kuirado, lavado kaj trinko, ili devis uzi la malpuran akvon el tiu parto de la Suĉoŭ-rivereto. Estas facile kompreneble ke je pluvaj aŭ ventegaj tagoj tia eluzita boato povis provizi al ili malmulte da ŝirmo.

Nur depost liberiĝo la sorto de Ĉu kaj lia familio multe pliboniĝas, ĉar lia ĉirkaŭaĵo estas iom post iom plibonigita de la Popola Registaro. Stratlampoj estas instalitaj en tiu mat-buda kvartalo; matbud-loĝantoj ne plu uzas kaj trinkas la malpuran akvon el la Suĉoŭ-rivereto, ĉar publikaj akvostacioj estas provizitaj; la pasejoj kotaj je pluvaj tagoj estas jam pavimitaj, kaj kloaksistemoj estas aranĝitaj. Rezulte de la stabiliĝo de varprezoj kaj bonvivigaĵoj provizitaj de la fabrika sindikato, Ĉu kaj lia familio povas ne nur manĝi rizon, sed ankaŭ legomojn kaj viandon. Kiam ilia bebo naskiĝis lastfoje, lia edzino ĝuis la hospitalajn prizorgojn laŭ la Labor-Asekura Regularo. Lia plejaĝa filo estas ankaŭ vizitanta lernejon depost liberiĝo.

Tiuj ĉi ekzemploj de la plibonigo de la vivo de la laboranta popolo jam forte influis lian mensan perspektivon. Li jam komencis rekonigi la fakton, ke la Komunista Partio estas la Partio de lia propra klaso—la laborista klaso, kaj lia klaskonscio estas alte levita. Konsekvence, li propravole prenis sur sin la iniciaton en la ŝparo-kampanjo kune kun siaj kunlaborantoj en la kaldronego-ĉambro, kaj atingis la rezultaton elŝpari 154 tunojn da karbo dum la lasta jaro. De tiam, normala rekordo de 2-tuna taga ŝparo de karbo estas tenata. En povo-konsumo kaj aliaj flanktoj li ankaŭ efektividigis grandajn ŝparojn.

Ĉe la lastfoja demokrata merittaksa kunveno, Ĉu kaj aliaj du talentaj kaj entuziasmaj laboristoj estis balotitaj de siaj kunlaboristoj, ke ili havu la antaŭrajton transloĝiĝi en la novajn hejmojn en Caŭĵang-vilaĝo.

Kiam la novaĵon oni unufoje sendis al la familio Ĉu, ili fariĝis tiel ekscititaj ke ili maldormis la tutan nokton.

“Nun,” diris la patro de Ĉu kun granda emocio, “nia piedpremata vivo jam atingas sian finon. Por tio, ni devas esti dankaj al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj la Popola Registaro, ĉar alie ni neniam povus esperi pri tiaj benoj.”

“Sen la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ, sen la ĉiam plimultiĝanta produkto fare de niaj kunlaborantoj,” la edzino rimarkis, “tiaj komfortaj laboristaj loĝejoj jam neniam fariĝus realo!”

Kiam ili transloĝiĝis al n-o 127 de Caŭĵang-vilaĝo meze de la ĝojkrioj kaj aplaŭdoj de amasoj da bonvenigantoj, ili ĉiuj, portante siajn plej bonajn vestojn kvazaŭ okazus iu grava festo, saltadis pro ĝojo neesprimebla per vortoj. Por montri sian dankemon, Ĉu, antaŭ ĉio, surpendigis la portreton de Prezidanto Maŭ, kiu estis al li prezentata de la sindikato. Post tio, li kondukis la prezidanton de la fabrika sindikato kaj siajn kunlaborantojn por vidi sian novan hejmon, plenan je sunbrilo kaj freŝa aero, kun larĝaj fenestroj, laktblankaj muroj, grandspaca kuirejo kaj freŝe-nova necesejo kaj neprisonĝitaj mebloj.

“Mi ne volas esprimi mian dankemon al mia Partio kaj la Popola Registaro nur per malplenaj vortoj. Mi garantias fari ĉion kion mi povas por plue altigi produkton kaj ŝpari pli multe da karbo por tiel montri mian dankon per konkretaj agadoj, ĉar tiaj agadoj certe akcelas havigi al ĉiu el niaj kunlaborantoj similajn belajn loĝejojn.”

Fukango.

## Laboristoj Transloĝiĝis en Novajn Hejmojn

Pli ol mil progresaj laboristoj kaj iliaj familioj transloĝiĝis en la novekonstruitan Caŭĵang-vilaĝon je la antaŭvespero de la 31-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Komunista Partio. Tiu ĉi loĝeja projekto ĉe la okcidenta ĉirkaŭaĵo de la urbo estas unu el la multaj laboristaj loĝejoj projektoj entreprenataj en Ŝanhajo.

La nova projekto konsistas el 167 du-etaĝaj domoj en netaj vicoj, kun ĝardenoj antaŭ si. Ĉiu nova hejmo estas kompleta kun akvokonduko kaj kuirejo. La projekto estas simila al parko kun siaj etendiĝantaj razenoj, floroj, salikarboj kaj ruĝa ponto trans iu fluanta rivereto. Ĝi ankaŭ enhavas foirplacon por la oportuno de la loĝantoj, kooperativon, kuracejon, bandomon, lernejon, poŝtoŝtationojn kaj kinejon. Poste estos aldonataj ankaŭ hospitalo, infanvartejo kaj klubdomo.

La familioj komencis transloĝiĝi je la 25a de junio. Ili estis bonvenigataj de la reprezentantoj de la Popola Registaro kaj sindikatoj ĉe la pordego. Sin vestinte en siaj plej bonaj vestoj, ili kreis ĝojan bildon kiam ili ekposedis la novajn hejmojn.

En la venonta jaro, novaj loĝejoj projektoj estos efektividigitaj por aliaj 20.000 laboristaj familioj kiel parto de ampleksa loĝeja plano kiu estas establonta tute novajn vivnormojn por la laboristoj de tiu ĉi urbo.

(F. K.)

Mezurado de dezertigita tero por rekulturo por kontentigi la kreskantan produktan forton de la farmo.





Prezidanto Kin Paj-ŝan kaj farmo-membroj elektas sidejon por sia nova infanvartejo.

## “La Fajrero”—La Unua Kolĥozo de Ĉinio


de la Huaĉuan-a Irigaciata Farmo, Ĉiamusu, Nordorienta Ĉinio, montras la vojon al grandskala moderna socialisma agrikulturo.

Tiuj ĉi elektraj pumpiloj de la Huaĉuana Irigaciata Farmo levas akvon el Sungarivivero por irigacii la teron de la kolĥozo.





Elektra senŝeligilo ĉe la kolĥozo "La Fajrero"





La traktora stacio de Huaĉuan sin pretigas por printempa plugado sur la farmo "La Fajrero".

*La Nova Vivo de la Kamparanoj sur*

## La Unua Kolĥozo de la Lando

Multaj koreo-ĉinoj estas membroj de tiu ĉi prospera kolĥozo sur la suda bordo de Sungari-rivero.

Oni klarigas pri la funkcio de la transformatoro de la elektra pump-stacio de la kolĥozo ĉe Huaĉuan.



Tipaj domoj de la membroj de la kolĥozo "La Fajrero"

Ĉe la senpaga kuracejo de la kolĥozo




Prezidanto de la virina asocio, Ĉin Caj-ĉin, gvidas produkto-kunvenon de la virinaj membroj de la kolhozo.



Ĝia kooperativo provizas la membrojn per ĉiaj bezonaĵoj.

La geknaboj ĝoje aŭskultas rakonton kiel la fafinis la tagojn de mallumo.





La 1,054 metrojn longa movebla akvobarilo ĉe Tajpinkoŭ kun 54 kluzpordoj kontrolas la akvon fluantan en la inundakvan detenejon de Jangze-rivero — ĝi estas la plej granda akvobarilo en Ĉinio.


## La Inundakva Detenejo Jangze-rivero

La kompletigo de tiu ĉi projekto sur la meza parto de Jangze-rivero likvidis multjaran minacon de inundo.

Vidaĵo de la kluzpordoj de la akvobarilo ĉe Huangŝantoŭ

★

Laboristoj aklamas la venkon je kompletigo de la movebla akvobarilo ĉe Tajpingkoŭ je la 16a de junio.



# TRAGIKOMEDIO DE KAMPARANA FAMILIO

Lin Kang

En la malnova socio, la feŭda geedziĝa sistemo ligis la virinojn kiel kateno. En la vilaĝo Ŝianghokie, Luŝan-gubernio, Honan-provinco, estas virino, nomata Paŭ Tung-hua. Kamplaboron, hejmlaboron, ĉion ŝi faris admirinde, la najbaroj ĉiuj ŝin laŭdis, kaj tamen ŝi estis hejme sklavo.

Paŭ Tung-hua estas 35jara ĉijare, edziniĝis kiam 20jara, arbitre aranĝite de siaj gepatroj. Nur post la edziniĝo ŝi eksciis ke la edzo estas malsana: li nazosangis dum dek jaroj, kun flavpala vizaĝo, kaj laboris ankaŭ ne tre bone. Elbuŝe ŝi ne kuraĝis pri tio paroli, tamen ankore ŝi ja ne lin ŝatis, kio estis facile videbla. La bopatrino kaj la edzo decidis ŝin subigi per rimedo subprema. En ŝia familio estis ses anoj: la gebopatroj, la edzo, du pli junaj bofratinoj kaj ŝi mem. En ĉi tiu mezkamparana familio regis sistemo de feŭda ordo. La bopatrino estis malbonkora, konate en kelkaj li-oj\*. Tuttage ŝi serĉis erarojn de la bofilino: trodensis la kaĉo, tromaldensis la supo, malŝpariĝis greno, aŭ fadeno . . . .se la bofilino faris vizitojn, ŝi estis riproĉata malĉasta, se ŝi kunportis grandan pakajon irante sian patran hejmon, ŝi estis riproĉata je ŝtelado. Ŝi estis blasfemata per ĉiaj ajn malicaj diroj kaj insultaj vortoj elpenseblaj. La du filinoj helpis la patrinon turmentadi la bofratinon. La bopatro estis homo kiu zorgas pri nenio krom laboro. La edzo Ĉang Tung-ting kruele batadis sian edzinon. Apenaŭ forpasis 10 tagoj aŭ duona monato, kiam ŝovelilon, vektan, rulbastonon. . . .ĉion ajn li ekprenis por ŝin bati. Paŭ Tung-hua ofte sangis je la kapo pro la batado. Nokte ŝi estis batata kun riglita pordo, kaj tage la bopatrino baris la pordon por malhelpi interpacigantojn eniri. La bopatrino diris al sia filo: "Bofilino estas terotegajo sur muro, forŝirinte la malnovan oni povas ĝin anstataŭi per nova." Paŭ Tung-hua iam provis ĉiel gajni la favoron de la bopatrino kaj la edzo, ellitiĝis antaŭ tagiĝo kaj enlitiĝis duonnokte por fari sian laboron, kaj ĉion faris atente kaj zorgeme, tamen ĉio ĉi vaniĝis. Ŝi iam intencis forkuri, tamen timante malhonorigi sian patrofamilion ŝi ne kuraĝis tion fari. Post unu jaro da tia vivo, ŝi tute perdis la volon vivi. En la dua jaro post sia edziniĝo, foje ŝi sin fermis en la muelejo kaj sin pendigis, sed la najbaroj rompis la pordon kaj ŝin savis. De tiam en sia poŝo ŝi ĉiam kaŝis opion por memmortigo. Post aliaj du jaroj, Paŭ Tung-hua naskis knabon kaj nur tiam forlasis la intencon sin mortigi kaj de tiam vivis por sia filo.

La filo nomiĝis Kuan-in, ĝis sia deka jaro li neniam estis prenita de sia patro en la brakumon aŭ zorgata de li pri vestado. Kiam la infano estis kvarjara, ĉi tiu familio kreskigis du muojn da kotono. De semado ĝis rikolto, Paŭ Tung-hua multe partoprenis en la ĉefa laboro. Post la rikolto, la bopatrino elektis la bonan kotonon kaj donis al ŝi unu ĝin-on kaj 13 liang-ojn da malbona. Paŭ Tung-hua tre malkontentis, kaj mem elektis du ĝin-ojn da bona kotono, intencante fari por Kuan-in novan kompletan da vatitaj vestoj. Tion eksciis la bopatrino, unue ordonis sian filon ŝin batadi kaj la duan tagon mem devigis ŝin redoni la kotonon. Paŭ Tung-hua diris: "Kuan-in estas jam tiel granda, tamen li ankoraŭ neniam ricevis ian veston de vi. Mi

laboris dum la tuta aŭtuno por la kotono ĉu mi ne rajtas havi unu parton?" La bofilino eĉ kuraĝis kontraŭstari, ĉu tio estis tolerebla! La kruela bopatrino turmentis sian bofilinon dum la lastaj ses jaroj buŝe, sed tiun ĉi fojon ŝi uzis manojn. Ŝi prenis benkon kaj postkuris la bofilinon en la tuta korto por ŝin bati. Helpis en la batado la du filinoj. La pliaĝa ĵetis pelvon kun supo kaj rizo je la kapo de la bofratino. Paŭ Tung-hua rifuĝis ĉe najbaron en la sama korto. La bopatrino kun siaj filinoj enrompis en la ĉambron. Post tiu ĉi malpaco la bopatrino kaj la bofilino ne plu povis vivi kune sub la sama tegmento kaj invitis la onklon por aranĝi pri apart-loĝado.

La familio estis dividita. Paŭ Tung-hua pensis en si: "Ne plu estos malpaco, ĉar nun kunvivis aparte la geedzoj." Sed ŝi eraris. La bopatrino potenco ankoraŭ pezis sur ŝia kapo. La edzo traktis ŝin same kiel antaŭe; li batis ŝin se li ne havis por manĝi aŭ por vesti. El lia buŝo ĉiam libere elverŝiĝis: "Mi ekседzinigos vin" aŭ "Mi forvendos vin." Paŭ Tung-hua timis en sia koro, tuttage verŝis larmojn kaj ŝia vizaĝo flaviĝis pro la plorado. Ilia kampa grundo estis sabla, kaj pro sama malkonkordo inter si la geedzoj nature malzorgis la kulturon sur la kampo. Ili ne sterkis la grundon kaj lasis la herbaĉon kreski tiel alte kiel la maizo.

Kiam la gubernio estis liberigita, Paŭ Tung-hua gajnis sian liberecon. Ŝi estis elektita delegito al kongreso de la kamparanoj en la gubernio. Ŝi ĉeestis guberniajn kaj distriktajn kunvenojn. La bopatrino post la dorso nomis ŝin frenezulo, sed ŝi ne atentis kaj aktive laboris. La virinoj subtenis ŝin. Sed ŝi pensis, ke malkonkordaj inter si, ŝi kaj ŝia edzo neniam povis harmonie kunvivi. Kaj ŝi ankaŭ pensis, "Nuntempe virino povas mem perlabori siajn vivrimedojn, kial mi ankoraŭ kunvivu kun li, tage kaj nokte tolerante lian batadon kaj insultadon?" Kiam Ĉang Tung-lu fariĝis la prezidanto de la kamparana asocio, ŝi apartiĝis de sia edzo. De tiam la viro ne plu donis al la virino liang-on da salo nek portis por ŝi sitelparon da akvo; la virino ankaŭ ne plu faris por la viro paron da ŝuoj aŭ stebon da kudrado.

Kuan-in loĝas kun sia patrino. Ili ricevis 2.6 muojn da tero. Paŭ Tung-hua atente kaj zorgeme aranĝis sian vivon. Sur la du muoj da tero ŝi kreskigis grenojn, sur la cetera kotonon, terpomon, k.t.p. Ŝi pensis, ke ne estas bone sole dependi de aliaj en jarlonga terkulturado. Tial krom tro pezaj laboroj, ŝi mem faris ĉion. Sed la grundo estas tro malfekunda, la grenoj rikoltitaj ne sufiĉis por ilin nutri. Poste ŝi luigis parton de sia tero al alia, kaj mem faris flankajn produktojn. Ŝi ellitiĝis kiam koko kriis kaj ŝpinis, teksis kaj faris plandojn de ŝuoj ĝis mez-nokto. Tiamaniere ŝi sukcesis sin vivteni. La ŝuojn faritajn dum 1949 ŝi forvendis kaj per la mono ŝi aĉetis porkidon. Por nutri la porkidon ne estis facila afero. Ĉar ŝi ne havis sufiĉan monon por aĉeti branon. Ŝi devis iri ĉien por kolekti herbon, fabo-feĉon, melon-ŝelon, k.t.p. Post duono da jaro la porkido plenkreskis en maturan porkinon. Ŝi naskis 13 porkidojn. Paŭ Tung-hua retenis unu viandporkon kaj vendis la ceterajn. Per la mono akirita ŝi

aĉetis provizon. Ĉiujare la porkino naskis du fojojn. Ŝi povis ŝanĝi la porkojn por 3 aŭ 4 hekto-litrojn da greno. Ŝia vivo pliboniĝis.

En la nova socio, dank' al ŝia laboro la malriĉa vivo de Paŭ Tung-hua iom post iom riĉiĝis; plue ĉar ŝi aktive partoprenis laboron de la vilaĝo, ŝia socia kaj familia pozicio ŝanĝiĝis. La pli aĝa el ŝiaj du bofratinoj jam edziniĝis, la juna partoprenis laboron, ili ĉiuj loĝis en la urbo kaj ricevis bonan edukon. Kiam ili revenis hejmen ili admonis sian patrinon ke ŝi bone traktu ilian bofratinon, kaj ofte ŝin vizitis. La bogepatroj ofte ĉeestis kunvenojn kaj ankaŭ sciis kia nova socio estis sub la gvidado de Prezidanto Maŭ. Kvankam la bopatrino diris ke ŝi ne ŝatas la bofilinon tamen ŝi ne plu insultis ŝin. Post manĝo de 1,000 ovojn kaj 5 ĝin-ojn da sukero, la edzo de Paŭ Tung-hua saniĝis de nazsangado kaj laboris pli diligente ol antaŭe. Dum la tritika rikolto antaŭ du jaroj, li fariĝis milicano. La feŭdismo en tiu ĉi familio de mezkampano jam renversiĝis. Sed inter la bopatrino kaj bofilino kaj inter la edzo kaj edzino malpaco ankoraŭ restis. Kiam ili renkontiĝis, unu turnis dorson al la alia.

En majo 1950 Prezidanto Maŭ proklamis la Leĝon de Geedziĝo. La propagando de la distrikta organizo en Ŝianghokio estis tre bona. Ĉang Tung-ting kaj Paŭ Tung-hua ambaŭ propagandis la geedziĝan leĝon inter la loĝantoj. Kiam ili legis la okan klaŭzon: "Geedzoj havas devon reciproke ami, respekti, interhelpi, kunvivi, unuigi, kunlabori, eduki infanojn, penadi por krei feliĉan familion, kaj novan socion" ili ambaŭ kortsuŝiĝis. La ideologio de Ĉang Tung-ting dum la lastaj du jaroj progresis kaj lia sinteno al virino tute ŝanĝiĝis. De post kiam li apartiĝis de sia edzino, li ofte pripensis pri ŝia boneco, kaj pentis malbone trakti ŝin estinte. Post kiam liaj du fratinoj foriris, li ne havis bonajn vestojn. La vesto, kiun li portis, neniam estis riparita kaj jam estis disŝirita ĉe la kubutoj. La patrino ofte vizitis sian pliaĝan filinon, lasante la patron kaj filon ĉe hejmo. Ĉar ili neniam praktikis kiel prepari manĝaĵojn, ili ne scias kion fari. La Leĝo de Geedziĝo instruis al ili pri harmonio en la familio, kio tiris ilian atenton.

Paŭ Tung-hua tiutempe ne plu ĉagreniĝis pri nutraĵo kaj vesto, sed ŝi renkontis malfacilaĵon kiam ŝi laboris sola. Ekzemple ŝi devis peti alian homon por plugi la teron. Ŝiaj bogepatroj jam maljuniĝis kaj devis esti zorgataj. Plue, de post liberiĝo, precipe de post ŝia unuopa vivo, ŝia bopatrino kaj ŝia edzo ŝanĝis sian sintenon al ŝi. La bopatrino farinte bongustaĵon ĉiam donacis iom al ŝi. Ŝi ankaŭ ofte aŭdis, ke ŝiaj bopatrino kaj edzo laŭdis ŝin post la dorso.

Krome, malbontraktita dum sia juneco, liberiĝinta post liberiĝo de sia vilaĝo, Paŭ Tung-hua estas tre dankema al Prezidanto Maŭ, kaj ĉion faras en la unua vico, pri kio Prezidanto Maŭ alvokas. Ŝi diris: "Nun Prezidanto Maŭ alvokas pri harmonio en la familio, ĉu mi povas ne obei?"

Estis la tempo de aŭtuna sarko, ĉirkaŭ unu monato post la proklamo de la Leĝo de Geedziĝo, iutage, Kuan-in laboris en la kampo. Preterpasinte kaj vidante sian filon, Ĉang Tung-ting haltis kaj diris: "Kuan-in, mi sarko por vi!"

Kvankam Kuan-in estis junaĝa, li estis komprenema. Dum tiuj ĉi tagoj li ofte aŭdis propagandon pri la Leĝo de Geedziĝo. Turnante al sia patro, kiu naskis sed neniam vivtenis lin, li fiksrigardis kaj diris: "Sarko, tagmeze mi diros al patrino ke ŝi preparu por vi olekukon."

Tagmeze Kuan-in revenis hejmen kaj diris al sia patrino pri ĉio ĉi. Lia patrino diris al li ke li revenu hejmen kun sia patro por vespermanĝo. Kiam krepuskiĝis, Ĉang Tung-ting venis kun sia filo Kuan-in. Kiam ili atingis la pordon, Paŭ Tung-hua estis ĝuste ĉerpanta akvon el la puto. Ĉang Tung-ting rigardis la rullevilon kaj diris: "Hodiaŭ mi sarkis por vi, kaj manĝos ĉe vi." Ĉerpinte duan sitelon da akvo el la puto ŝi diris: "Venu en la domon!" Ŝi preparis olekukon kaj krommanĝon. Manĝinte, Ĉang Tung-ting fumis pipon da tabako kaj poste foriris. Same tiel en la sekvanta tago. En la tria tago ankoraŭ same. En la kvara tago, post manĝo Ĉang Tung-ting denove sidis sur la benketo kaj fumis. Paŭ Tung-hua lavis potojn, pelvojn, kaj nutris la porkinon. Jam mallumiĝis, Ĉang Tung-ting ankoraŭ sidis kaj fumis. Paŭ Tung-hua demandis: "Kie vi dormos ĉi-nokte?" Ĉang Tung-ting respondis "Mi ne foriros!"

Jam pasis pli ol unu jaro de post tiu ĉi tago. La paro vivis pli kaj pli harmonie. Kamplaboro kaj domlaboro ambaŭ estis zorgataj. Dum la tritika kaj aŭtuna rikoltoj, la viro kaj virino kune laboris en la kampo. La viro gvidis, la virino helpis. La laboro sekskunigi porkojn nun transdoniĝis al la viro. Paŭ Tung-hua estas tre kapabla, liberigita el kampa laboro, ŝi povas ŝpini kaj teksu kaj la mono kiun ŝi enspezis jam sufiĉas por la vintra kaj somera vestoj de la tuta familio. La viro nun traktas la virinon multe pli bone ol antaŭe. Se la virino deziras fari ŝuojn, la viro kreskigas kanabon; se la virino devas iri kunveni, la viro diras: "Mi lavu la kuirpotojn por vi." Ĉang Tung-ting povoscias legi. Lastavintre li kuraĝigis Paŭ Tung-hua viziti la vintran lernejon. Li diris: "En la vintra lernejo lernis ankaŭ patrinoj portantaj infanojn, vi iru kaj registriĝu." Paŭ Tung-hua diris: "Mi tuj vizitos la vintran lernejon post la resaniĝo de mia dentdoloro." Pri ĉia ajn afero en la familio ili konsiliĝis antaŭe. Kuan-in fariĝis karulo en la familio. La geedzoj konsiliĝis por ŝpari monon por lin sendi al la mez-lernejo en la urbo, kiam Kuan-in finos la kurson en la elementa lernejo. La bopatrino ankaŭ amas Kuan-in, kaj nun ŝi ankaŭ komprenas, ke Paŭ Tung-hua estas vere ŝia propra bofilino. Paŭ Tung-hua ankaŭ respektas la bogepatrojn. Se la maljunuloj havas kapdoloron aŭ febron, varma supo kaj varma rizaĵo estas tuj alportitaj. En la lasta vintro, dum la kontrolo pri la efektivigo de la Leĝo de Geedziĝo, dank' al helpo de kadroj de la distrikta oficejo kaj virina unuigo, ili okazigis familian kunvenon, kaj decidis denove kune vivi. En tiu ĉi kunveno ili ankaŭ faris planon por fekundigi siajn dek muojn da sabla tero. Kiam la porkino naskos porkidojn, ili povos interŝanĝi tiujn por 2 hektolitroj da maizo. Tiam ili aĉetos azenon. La domo en kiu ili loĝas jam longe ne estis riparita. Ili ĝin bone riparos ĉijare. La geedzoj nun ofte ŝercas kaj ridas. Kiam mi vizitis, Ĉang Tung-ting diris: "Patrino de Kuan-in, oni diris ke la Leĝo de Geedziĝo estas leĝo de eksedziĝo. Hodiaŭ kamarado Lin el la urbo estas en la vilaĝo, ni eksgeedziĝu!" Paŭ Tung-hua diris: "El la dudek sep klaŭzoj de la Leĝo de Geedziĝo, vi nur memoras tiun ĉi klaŭzon! Sen la Leĝo de Geedziĝo de Prezidanto Maŭ, ni kvin personoj dise vivus pli kaj pli malbone!"

Antaŭ 20 jaroj Paŭ Tung-hua naskis Kuan-in, nun ŝi denove gravediĝis.

Tradukis: W. S. Ho

\* 1 li-o =  $\frac{1}{2}$  km.

† 1 ĝin-o = 16 liang-oj =  $\frac{1}{2}$  kg.



# Kiel Estas Kreita la Metodo de Rapida Ellerno de la Ideografoj

Po Ŝeng

—Raporto post la intervjuo al Ĉi Kien-hua, la kreinto de M.R.E.I.\*—

Por informiĝi pri la historio de la kreado de M.R.E.I., la verkinto intervjuis Ĉi Kien-hua.

Ĉi Kien-hua estas modela instruisto por klerigado en Sudokcidenta Militregiono de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj kompartiano. Li naskiĝis en malriĉa kamparana familio en Kia-gubernio, Honan-provinco. En lia infaneco, la patro mortis pro malsato en kaduka templo, la avino mortis ekstere kiel almozulino, ankaŭ liaj gefratoj mortis je malsano. Postvivis nur li kaj la patrino ĉe la domo de la patrino onklo, li helpadis plugi teron kaj kolekti fajrlignon. Kiam li estis 14-jara li eniris senpagan libertempan lernejon. En la unua lernohoro la instruisto instruis al li la fonetikajn signojn “—x u (i, u, y)”, kaj en la dua vespero, la novajn signojn “《y (ga)》” kies elparolo similas al la kvako de anaso. Tio tiel interesis lin, ke li baldaŭ ellernis ĉiujn la signojn “勺女口口 (b, p, m, f)”. Post lernado de 7 aŭ 8 vesperoj, li ne nur ellernis ĉiujn fonetikajn signojn sed ankaŭ iom komprenis pri la prononcado. Kaj en la sama jaro, je la permeso de l' onklo li komencis vizitadi la regulan elementan lernejon de la vilaĝo kaj estis metita en la triajara klaso. Poste, kelkfoje interrompita en lernado li finfine estis diplomita en malsupera mezlernejo. En memlernado, li ricevis vortaron kun 8-mil vortoj kaj dank' al la fonetikaj signoj li sukcese tralegis la vortaron en dek unu tagoj. Tiu ĉi sperto estis grava inspiro por lia posta kreo de M.R.E.I.

En 1948, post la liberiĝo de Kia-gubernio, Honan-provinco, li sukcese trapasis la eniran ekzamenon de la Milita kaj Politika Universitato de Centra Ĉinio. Kaj post la gradiĝo li estis sendita por labori en sanitara fako de iu trupo. Iutage, la grupestro diris al li: “En la estonteco eble vi devos prizorgi klerigan laboron kaj instrui la batalantojn lerni la ideografojn”. Tiam li ekcerbumis kiel instrui la batalantojn per rapida metodo, kaj li ekpensis pri la fonetikaj signoj. Post nelonge, alvenis en la laborgrupon iu batalanto nomata Vang Siang-teh, kiu sciis nur malmultajn ideografojn. Ĉi Kien-hua do komencis prove instrui lin legi la popularan legajon *Nova Sentencaro en Triidegrafaj Versoj*, eldonitan de la popola armeo, helpe de la fonetikaj signoj, kaj akiris grandan sukceson. Vang Siang-teh ellernis proksimume po 50-ideografojn en ĉiu tago, kaj nur en kelkaj tagoj li jam tralegis la tutan libron. La nova metodo pli ol dekoble plirapidigis la lernadon ol la pasinta metodo laŭ kiu oni povis instrui nur 3 aŭ 5 ideografojn al la batalantoj. Kaj la prova instuado alte levis lian

memfidon. Tuj poste li estis ordonita labori kiel kleriga instruisto en la trejna grupo de la sanitara fako. Subtenate de la Partio kaj la superaj respondeculoj, li kuraĝe komencis instrui ideografojn al la grandnombraj batalantoj per la fonetikaj signoj. Tiam, la trupo estis militiranta al la Sudokcidento. En la plej malfacilaj kondiĉoj por lerno dum la marŝado li obstine persistis instrui la batalantojn lerni ideografojn per fonetikaj signoj. En 1950, kiam la trupo alvenis Zunji-gubernion, Kuejĉou-provinco, inter la batalantoj disvastiĝis la movado de leglernado. Ĉi Kien-hua ankoraŭ instruis la batalantojn lerni la ideografojn per la fonetikaj signoj. Li elektis 1,200 ofte uzatajn ideografojn, kaj aldonis al ili fonetikajn signojn. Ĉiuj ĉi tiuj materialoj estis skribitaj sur du grandaj nov-vortaj tabeloj, kaj li plenenergie instruis la batalantojn, po 40-ideografojn en ĉiu tago. En tiu periodo li pli detale studis la psikajn karakterizaĵojn kaj vivmanieron de batalantoj kaj vidis ke ili havas riĉajn batalajn spertojn, altan kapablon de kompreno kaj tre urĝan postulon por klerigo, sed al ili mankis memfido, ĉar ili opiniis ke estas malfacile por ili lerni ideografojn pro maljuniĝo kaj malboniĝo de memoro. Li komprenis ke por solvi la lernodeziran kaj malfacilo-timan kontraŭdiron en la psiko de la batalantoj, unue oni devas forlasi la pasintan instruon metodon kaj rompi la rutinon lerni po 3-5 ideografojn en ĉiu tago. Samtempe laŭ la karakteroj de la batalantoj ŝati simplecon, “unu aferon en unu fojo” kaj sturman batalon, li unue lernigis la batalantojn koni kaj voĉlegi ideografojn, poste ilin klarigi kaj skribi kaj pliposte prove legi ĵurnalon kaj skribi parolon. Tiu ĉi metodo estis tute malsama ol la pasinta malnova metodo—instrui samtempe ideografojn voĉlegi, klarigi, skribi kaj uzi. Tamen, je la komenco ankoraŭ estis iuj batalantoj kiuj ne havis fidon je la metodo. Ekz. batalanto Liu



**Batalantoj sur la Produkta Fronto**

de Hua Tian-ĵou

Kuo-ting diris: "Instrui 40 ideografojn en ĉiu tago? Oni ja ne manĝas kaj trinkas ideografojn!" Batalanto Sun Ĉi-juan diris: "Instruu kiom vi volas, sed mi lernos nur kiom oni kutimas." Kaj iu alia batalanto diris: "Eĉ rompinte mian kapon oni ne povus enmeti en ĝin tiel multajn ideografojn en unu tago!" Komprenante la penson kaj la sentimenton de la batalantoj, Ĉi Kien-hua vidis, ke nur post sufiĉa mobilizado kaj kun penso koncentrigita oni povas entrepreni la lernadon en batalmaniero kaj akiri sukcesan rezulton. Kaj tion li atentis dum la instruado. Li diris al la batalantoj: "Mi garantias ke vi povos ellerni 40 ideografojn en unu tago, sed vi devas esti memfidaj. En la Huajhaj-batalo ni estis memfidaj por venki, ĉu nun en sinklerigo al ni jam mankas memfido? La kurlantajn malamikojn ni povis kapti, ĉu la senkrurajn ideografojn ni tamen ne povas kapti?" Kaj li daŭre demandis la batalantojn: "Ĉu oni bezonas armilojn en batalado?"

"Bezonas!" respondis la amaso.

"Ĉu oni bezonas instrumenton en produktado?"

"Bezonas!" respondis la amaso.

"Ĉu oni bezonas metodon en lernado?" denove li demandis.

"Bezonas!" respondis la amaso.

Li do laŭte diris al la batalantoj: "Bone, nun ni jam havas bonan metodon por lerni la ideografojn, per kiu oni povas ellerni kelkdek, kelkcent ideografojn en ĉiu tago. Se vi ĉiuj konsentos lernadi tutenergie kaj kun memfido, mi povas garantii ke post 3 aŭ 4 semajnoj vi ĉiuj povos legi popularajn librojn kaj ĵurnalojn kaj elskirbi simplajn artikolojn."

Post tiaj plurfojaj mobilizoj entuziasmiĝis la batalantoj por lernado. Li do tutenergie prizorgis la instruadon, kaj mastris la sentimenton de la batalantoj en lernado. Kaj samtempe laŭ la principo "de facilo al malfacilo", li komencis instrui de "—×□ (i, u, y)." Rezulte, li ne nur akiris grandan sukceson, sed ankaŭ plibonigis sian metodon. La batalanto Liu Kuo-ting, al kiu antaŭe mankis memfido, diris post tritaga lernado: "En la unua tago mi ellernis 40 ideografojn;

en la dua kun penado mi ellernis 60 ideografojn kaj en la tria, he! eĉ 80 ideografojn, mi tute ellernis." Kaj post sep tagoj Liu Kuo-ting, kiu antaŭe konis nur pli ol 250 ideografojn, ellernis jam 1,300 ideografojn.

Dum instruado Ĉi Kien-hua vivece gestante klarigis la lecionojn kaj ideografojn al la batalantoj per ilia familiara lingvo. Li diris al la batalantoj: "Oni devas trakti la lernadon de la fonetikaj signoj kaj ideografoj kiel batalon. Kamaradoj, vi ĉiuj ŝatas la sturman bataladon. Hodiaŭ ni ankaŭ devas lerni kun la spirito de sturmulo. En milito oni devas obei la direktadon de la komandanto kaj en leglernado oni ankaŭ devas obei la direktadon de la instruisto. Vi ĉiuj estas sturmistoj, kaj mi, via grupestro." Poste li gvidis la amason kanti "Viciĝu kun la Lernaj Modeloj", kiu estis nova kanto laŭ malnova melodio. La entuziasmo de la amaso tuj leviĝis. Post kelkfoja kantado li diris: "Bone, nun mi komencu instrui al vi la fonetikajn signojn. Li montris la signon "—" demandante kiel oni devas ĝin prononci. El la amaso iu kriis: ĝi devas esti prononcita "i". Li do gvidis la amason altvoĉe prononci "i". Por klarigado li ofte uzis la plej konatajn de la batalantoj aferojn, objektojn kaj vortojn. Kiam ĉiuj batalantoj tute ellernis la fonetikajn signojn, li komencis instrui la silabadon kaj poste ideografojn.

En aŭgusto de 1950, Ĉi Kien-hua estis elektita reprezentanto por partopreni la Unuan Konferencon pri Kultura kaj Eduka Laboroj de Kuejĉou-Militregiono. En tiu kunveno oni speciale diskutis pri M.R.E.I. Post la kunveno Ĉi Kien-hua prezentis la procedon de sia instrua metodo. Ĉiuj ĉeestantoj detale pristudis la metodon, kaj la supera institucio ankaŭ sendis al li laborgrupon por helpi lin resumi la spertojn kaj sekve la metodo akiris pluan plibonigon. Depost tiam, M.R.E.I. komencis prove disvastiĝi en la trupoj de la Kuejĉou-Militregiono. La rezulto de la pluraj provoj en la trupoj dum pli ol unu jaro pruvis ke M.R.E.I. estas bona por forigi la analfabetecon.

La sukceso de M.R.E.I. estas akirita, kiel diris k-do Ĉi Kien-hua, "ĉefe dank' al la gvido de la Partio kaj la superaj institucioj. Sen la direktado de la Partio, sen la priatento kaj subtenado de la gvidaj k-doĵ, sen la komuna praktiko de la amaso, sen la helpado de la propagand- kaj klerig-laborantoj en ĉiuj trupoj, oni eĉ ne povus facile revii pri kreiĝo de tia metodo." Kaj li plue diris: "La sukceso estas akirita ne nur dank' al la metodo mem, sed ĉefe dank' al la alta politika konscio, la spirito de konscia lernado kaj persisteco en pena studado de la batalantoj de niaj trupoj." En nova Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la suprajn kondiĉojn posedas ne nur la batalantoj de la trupoj, sed ankaŭ la laboristoj, kamparanoj kaj la ĝeneralaj civitanoj. Tio ĉi estas la kaŭzo ke M.R.E.I. devas kaj efektive povas disvastiĝi en Ĉinio.

Elĉinigiis Zekun



Faro de patriotisma multprodukta plano por respondi la defion de la interhela grupo de Li Ŝun-ta. Lignogravuraĵo de Li Ĉjun

\*Mallongigo de "Metodo de Rapida Ellerno de la Ideografoj".

## La 31-a Datreveno de la Fondiĝo de Ĉ.K.P. Celebrita

La 31a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Komunista Partio estis entuziasme celebrata tra Ĉinio je la 1-a de julio.

Grandaj celebraj kunvenoj okazis en Pekino, Tienzin, Ŝenjang (Mukdeno), Ŝanhajo, Nankino, Hankoŭ, Kantono, Sian, Lhasa kaj aliaj grandaj urboj en Ĉinio. Amaskunvenoj en Ĉungking kaj Ĉengtu okazis samtempe kun la ceremonioj okaze de la malfermo de la nova Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo.

Laboristoj celebris la datrevenon per konkursoj por pliprodukto kaj pligranda efikeco. La laboristoj de la Nordĉinia Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj en Pekino publikis sep progresintajn labormetodojn por pliigi efikecon. Ili estis parto de la 143 raciigaj proponoj faritaj de la laboristoj. La redakcio de Popola Tagjurnalo en Pekino estis inundita de gratulaj leteroj de industriaj laboristoj. En sia propra simpla lingvo la laboristoj priskribis la mirindajn ŝanĝojn en sia vivo, sian feliĉon, fieron, entuziasman spiriton kaj fidon pri la prospera estonteco. Ĉion ĉi tion, ili skribis, ili ŝuldas al la granda Ĉina Komunista Partio.

## La Dua Datreveno de Korea Milito

La dua datreveno de la milito en Koreio estis markita je la 25-a de junio en Pekino, Ŝanhajo, Sian kaj aliaj urboj per kunvenoj ĉe kiuj la ĉina popolo refoje firmigis sian decidon subteni la korean popolon en ĝia rezistmilito kontraŭ Usona agreso.

La ĵurnaloj publikis komunikon de la Centra Stabejo de la Korea Popola Armeo, kiu montris ke inter la 26a de junio, 1951 kaj la 15a de junio 1952 la malamiko perdis 325,479 homojn, mortigitajn, vunditajn, kaptitajn kaj kapitulacintajn. Inter ili estis 185,885 oficiroj kaj soldatoj de la puparmeoj de Singman Rhee, 129,945 usonanoj, 7,445 britoj, tri francoj, 462 turkoj, 1,181 kanadanoj, 82 filipinanoj, 406 taj-oj, 53 grekoj kaj 17 kolombianoj.

En la sama periodo, la populaj fortoj faligis 3,692 malamikajn aeroplanojn kaj vundis aliajn 2,230.

La Ĉina Pac-komitato publikis specialan raporton pri la rezultoj de la tutlanda kampanjo de donacado de pezaj armiloj. La raporto montris ke inter la unua de junio, 1951

kaj la 31a de majo, 1952 la ĉina popolo donacis pli ol 5,565,000 miliojn da juanoj, kiuj sufiĉas por aĉeti 3,710 batal-aeroplanojn.

Okaze de la datreveno, speciala foto-ekspozicio pri la milito en Koreio malfermiĝis en Pekino. La ekspozicio montras la heroan rezistadon de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj priskribas la subtenon kiun la popolo tra la mondo donas al la korea popolo.

## Kampanoj Pagas Malpli da Impostoj

La Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro anoncis je la 16a de junio novan reduktitan procenton por agrikulturaj impostoj. Samtempe nova sistemo por ilia kolektado estis enkondukita.

La nova sistemo baziĝas sur la jara meznombra agrikultura enspezo



de ĉiu membro de familio. La nova minimuma impostprocento estas fiksitita je 7% de la jara enspezo de kampano. Por la plejparto de la kampanoj la procento varias de 11 ĝis 15 procentoj. Kampanoj en ekonomia malfacilo pro naturaj plagoj, manko de laborforto aŭ senkapabligo, kaj familioj de popolarmeanoj estas aŭ tute liberaj de impostpagado aŭ pagontaj je reduktita procento.

Ĉijare impostoj estos kolektitaj nur de la Centra Popola Registaro. Ĉiaj lokaj aldonaj impostoj, kiuj sumas ĉirkaŭ 20% de la tuta publika greno (imposta greno), estas abolitaj.

Sub la Kuomintang-a reĝimo, kampano devis pagi 50 ĝis 80 procentojn de sia rikoltaĵo al la bienulo. Kaj el la restaĵo al li mem li devis pagi 30-60% kiel imposton al la Kuomintanga registaro. La abolo de tiu feroce impost-sistemo ŝparas al la kampanoj ĉirkaŭ 30 milion tunojn da greno ĉujare.

## Helpoj al Hindoj kaj Japanoj

Sumo de 2,000 milion juaŭ-oj (egalas al 421,941 rupioj) estas kolektita de popolanoj tra tuta Ĉinio por savi viktimojn en la malsataj regionoj de Hindio. Tiun ĉi monsumon oni sendis al Rajkumari Amrit Kaur, prezidanto de la Ruĝkruca Asocio de Hindio, je la 21-a de junio, de Li Teh-ĉjuan, prezidanto de la Landa Ruĝkruca Asocio de Ĉinio.

Alia sumo de 200 milion juaŭ-oj estis kolektita de la popolo kaj sendita al Japanio por savi la viktimojn de tertremo kaj tajdondo en Tokaĉioki, Hokkaido.

Sung Ĉing-ling, prezidanto de la Popola Urĝhelpa Administracio de Ĉinio, ricevis leteron de Tacuji Fuse, prezidanto de la Japana Asocio por Savo de Civitanoj, certigantan pri la ricevo de la mono.

La ĉina popolo informiĝis pri la plago per letero sendita de Cukisabua Dommastrina Asocio al Prezidanto Maŭ Ze-tung.

## Bankoj Reduktis Interez-procenton por Pruntedonita Mono

20-50-procenta reduktado al procentoj de interezo estis anoncita de la Popola Banko de Ĉinio en instrukcio al siaj filioj tra la lando. La reduktado ekvalidis je la 25a de junio.

La reduktitaj procentoj por pruntedonita mono aplikiĝas al ambaŭ publikaj kaj privataj entreprenoj kaj ilin stimulos. La reduktado ankaŭ malaltigos la produktan koston de fabrikoj. En agrikulturo, la novaj interez-procentoj ankaŭ stimulos produkton, ĉar ili aplikiĝas ankaŭ por la monpruntedonoj de la ŝtato al kampanoj.

Ekzemple, en Ŝanhajo procentoj por pruntedonoj al industriaj entreprenoj jam reduktiĝis al 0.0105-0.0165 t.e. inter 28% kaj 50%; procentoj por pruntedonoj al komercaj entreprenoj jam reduktiĝis al 0.0135-0.0195, t.e. 19-39%.

## NOVAJ LIBROJ PRI NOVA ĈINIO

**Por Nova Afero, Nova Maniero,**  
196-paĝa kolekto de noveloj.  
Ĝi kostas kiel tri numeroj de *El Popola Ĉinio*.

**La Plej Forta Voĉo de la Paco,**  
56-paĝa kolekto de poemoj.  
Ĝi kostas kiel 1 numero de *El Popola Ĉinio*.

**Mendu ilin ĉe nia administracio aŭ perantoj.**

# Kontraŭ la Glacia Torento de Som-rivero

(DAŬRIGO)

Ĉing Ni

## III

Jam krepuskiĝis.

Irante rapide, Hu Pin konsideris detale. Koto kaj akvo ŝprucis sub liaj piedoj, pluvo kaj neĝo veriĝis sur lian kapon, sed kvazaŭ pri nenio li konsciis.

“...Nur tio ne sufiĉas. Eĉ se mi kunligas ilin, ĉu ĝi ne estos rompita denove sub la akvopuŝo?...”

“Aŭ mi starigu duopigitan fadenon?... Ne, neeble, la tempo ne permesas!...”

“Sed kion fari?”

Droninta en sia meditado, li glitis neatente, kaj, pum! jam falis en la kotan akvon. Liaj sidvangoj doloris pro la frapiĝo, tamen li eĉ ne palpis, sed tuj leviĝis kaj rekomencis sian meditado.

“Ĉu mi ne povus duopigi nur tiun parton, kiu dronis en la akvo? Tio ja ne postulas tro multe da tempo kaj laboro... Ne, neeble, se tiu ĉi fadeno estas rompebla, ĉu la alia ne? Laŭ la aspekto de tiu pluvo, oni ne povas antaŭvidi kiom alte jam leviĝas la akvo.”

Neatendite liaj piedoj ekglitis kaj li falis refoje. Cetere tiun fojon li falis pli peze ol la antaŭan, tiel ke liaj membroj kaj dorso tuŝis la teron preskaŭ samtempe. Sed li ankoraŭ leviĝis tuj kaj iris antaŭen.

“Se mi fiksu ĝin tiel alte kiel tiuj apud la fervojo, ke ĝi tute ne povu tuŝi la teron... Kiel ajn timindaj estas la glacipecoj, ili ne povas flugi almenaŭ... Sed kie mi trovas nun tiel longajn stangojn? Ho, jes! Ĉu ne troviĝas kelkaj arboj ĉe la riverbordo?”

Glit! Liaj talio kaj brakoj svingiĝis kelkfoje ke li apenaŭ ne falis refoje.

“Ne. Tiuj arboj estas sufiĉe dikaj, sed tro malaltaj. Super tiel larĝa rivero, la meza parto de la fadeno kliniĝos ankoraŭ en la akvon...”

Tagiĝis jam. Estis klare videblaj la neĝflokaj kaj la pluvogutoj, kiuj flugis antaŭ la okuloj. Kiam li atingis la riverbordon, li ankoraŭ ne trovis sekuran rimedon, kiu povus solvi la malfacilan problemon. Li maltrankviliĝis.

Li staris stulte sur la bordo kiel ligna statuo, sub la neĝpluvo, en la onda muĝado, kuntirante la brovojn kaj fiksan la rigardon al la rivera supraĵo. En la rivero, la tumultantaj ondoj, kunportante grandajn kaj malgrandajn glacipecojn, kuris muĝante ruliĝante kiel aro da furiozaj sovaĝaj bestoj. La fino de la rompita fadeno jam malaperis sen postsigno, kaj nur tiu parto, kiu treniĝis ĉe la riverbordo nun leviĝis kaj malleviĝis dancante kvazaŭ ĝi luktis malcedeme kontraŭ la glacia ondar.

Li pensis: “La direktoro ofte diris: ‘Antaŭ la kompartianoj ne ekzistas nevenkeblaj malfacilaĵoj, kondiĉe ke oni ĉiam multe cerbumu kaj havu decidenon...’ Nun mi volontus elĉerpi eĉ mian cerbon, se ĝi povus fariĝi neforlavebla kaj nerompebla fadeno je ekzorco...”

Li denove pensis kvazaŭ senkonsile:

“Ve! kion fari?... Ĉu mi jam tiel rezignu?” Li konvulsiis plurfoje sub malvarma ekblovo. “Per kio mi respondu al Prezidanto Maŭ, al la partio kaj al la patrio? Cetere, se mi reirus nun nenion farinte,

kiel mi povus montri mian vizaĝon al la direktoro? Ekde mia alveno al Koreio, mi neniam malhonorigis la patrion dum mia tasko, kiom ajn malfacila ĝi estis, ĉu tiun ĉi fojon...”

Tion konsiderante, li kunpremis siajn dentojn, fiksis siajn okulojn furioze sur la rivermezo kaj diris en si kvazaŭ jure: “Malgraŭ ĉio mi nepre devas tuj kunligi la fadenojn, eĉ se tio kostus al mi la vivon— multe pripensu, mi ankoraŭ ne sufiĉe cerbumas.” Li retenis sian ekscititan emociion kaj pripensis aplombe kaj rapide kiel plej bone plenumi la komision...

Estis jam hela tago. La pluvo ĉesis. El inter la nubaro ekaperis strio de blua ĉielo, sed neĝfloketoj ankoraŭ flirtis maldense. Malvarma matenbrizo blovis preter lia nazpinto. La pluvomantelo tute frostiĝis kaj

“Estus pli bone starigi duoblajn fadenojn ĉe tiu kraketis ĉe ĉiu movo.

parto kiu restas en la akvo. Se unu estus rompita, restos la alia! Se tiu alia—” Li hezitis kun klinita kapo: “Ho, prave! ‘Mi starigu ankoraŭ pli multe da fadenoj. Se iu estus rompita, do restos la aliaj, se dua estus rompita, restos ankoraŭ aliaj. Certe la akvo ne povos rompi ĉiujn sammomente.’ Eksfulmis tra lia cerbo ia ideo—la pensfadeno abruptan kurbon faris: “Ha, bone, bone. Mi kuntordos ilin en kablono. La kuniĝo naskos al ili grandan forton. Eĉ flosanta monto ne rompos ĝin! Prave! Estas decidite.”

Li eksaltis pro ĝojo.

“Mi iru kolekti la fadenojn!” Li ĵetis rigardon al bombfaligita pino en malproksimo kaj tuj kuris for kun grandaj paŝoj.

La du fragmentoj, kiujn li forlasis hieraŭ nokte ankoraŭ kuŝis rigide en la sama loko. Li levis la fadenon, de kiu li tranĉis hieraŭ, kaj tuj komencis volvadi duone kliniĝante. La maldika kaŭĉuke volvita fadeno rampis rapidege en lian sinon kvazaŭ longa nigra vermo.

La fadeno estis baldaŭ finvolvita. Sed tro mal multe. Ĝi eĉ ne sufiĉis streĉiĝi trans la rivero dufoje. Li tuj kliniĝis por levi alian fragmenton. Li volvadis irante. Li ekvidis tre profundan kavaĵon estigitan de bombeksplodo baranta lian vojon. La fadeno firme frostiĝis en amaso da bombita tero kiel serpento kiu kaŝis sin en truo kaj restigis ekstere nur sian vostpinton. Ĝi malcedis obstine, kvankam li tiris per tuta forto.

Kiam li estis fortege maltrankvila, li ekmalkovris telefonan stangon duone forbombitan, kiu staris rigide apud la kavaĵo. Nova espero naskiĝis en lia menso. Li rapide malfermegis siajn okulojn kaj ĉirkaŭrigardis atente. Ha! Ĉirkaŭ dek metrojn for de li kuŝis duono da dika telefona stango, vicoj da blankaj porcelanaĵoj kaj sennombraj brilantaj ferdratoj dikaj kiel fabo treniĝis senorde sur la tero kiel amaso da disrampantaj velkaj lianoj.

“Haha! tiu ja estas tute laŭcela, ĉu ne? Unue mi portu ĝin trans la riveron, kaj poste,” li ĵetis rigardon al la kaŭĉuke volvita fadeno en la mano, “ĝin survolvi spirale per tiu ĉi... Se la drato ne estos rompita, ankaŭ la fadeno ne rompiĝos. Tio kostos al mi simple

vadi dufoje tra la rivero!" Sed li ekŝanĝis sian decidon: "Ĉu ne estus pli bone, ke mi unue survolvu la fadenon kaj poste portu ĝin tien? Tiukaze sufiĉos vadi unu-foje... Hm, tiel estus bone, sed kiel survolvi tiel longan fadenon sen ies helpo?... Nu, mi vadu du fojojn! Oni ne povas nur konsideri pri la ŝparo de energio. La ĉefaĵo estas bone plenumi la taskon!" Decidon li faris. Ĉirkaŭirinte la kavaĵon, li alpaŝis kaj levis draton. Ĝin rigardinte li diris en si kun fideco: "Haha! tia drato! Ĝi sufiĉas unuope. Kiel ajn furioza estus la torento, neniuj glacipecoj povos ĝin rompi, sed mem rompiĝos kontraŭ ĝi... Haha! la tasko estas jam plenumita je 99%! La restanta centono plenumiĝos je dentokunpremo." Subite li diris al si petoleme: "Ŝerco estas ŝerco, sed oni ne taksu sian kontraŭulon tre malforta. Estas preferinde ĝin duobligi. Ju pli asekurite, des pli bone..."

Tenante la malvarmegan pinĉilon inter la rigide frostiĝantaj fingroj, li tordis kaj tondis, detranĉis kaj kunligis. Li baldaŭ kolektis du dikajn volvaĵojn da drato, kiuj tute sufiĉis por la cirkonstanco laŭ lia kalkulado, kaj kuris fluge al la maljuna pino ĉe la rivero. La glacieroj kaj la kota akvo, kiujn disŝprucigis liaj piedoj, falis svarme sur lian pluvomantelon.

#### IV

Sub la ventblovo la tero estis ĉie kovrita de mal-dika glacitavolo.

La griza nubkurteno, kiu etendiĝis frostiĝinte tra la ĉielo jam disiĝis en disajn nuberojn. Antaŭ li, ĉe la breĉo inter montpintoj ŝvebis strio da matenruĝo, kiu speguliĝis rozkolore en la ondanta rivero kun florantaj glacieroj.

Hu Pin lokis unue la aparaton kaj la fadenfinon sub la pinon tre oportune por ke li tuj kunligu ĝin kun la alia fragmento, kiam li etendos ĝin returne. Poste li kuntordis du dratojn rapide kaj firme ĉirkaŭ la arboradiko. Demetinte la pluvomantelon kaj la vatitan pantalonon, streĉinte la ledzonon, enfaldinte la baskon de la vatita jako kaj metinte la pinĉilon ĉe la flanko, li tiris la dratojn per unu mano kaj tenis la kaŭĉuke volvitan fadenon per la alia, kunpremis siajn dentojn kaj paŝis plaŭde en la furiozan torenton kun decidemo. La rompitaĵoj glacieroj frapiĝis kontraŭ lia abdomeno kiel sennombraj pingloj.

Kiam li iris laŭflue kaj estis baldaŭ atingonta la rivermezon, subite glacipeco granda kiel muelilo, rajdante sur ondego, rapidis en lia direkto; li flankeniĝis por eviti sed jam tro malfrue kaj estis renversita en la akvon. Mordanta frostego ekpenetris preskaŭ ĝis la koro. Li baraktis forte kun la drato en la mano, tuj leviĝis el la akvo kaj daŭrigis la iradon malcedeme al la kontraŭa bordo.

Li surbordiĝis, sed neniuj arbo troviĝis najbare. Do li elektis grandan rokon kelkoble pli grandan ol ŝtona rulcilindro kaj ligis la draton firme al ĝi. Tiumomente liaj haroj jam frostiĝis je glaciaj fadenoj, sed li kvazaŭ konscius pri nenio kaj laboris tiel pacience kiel antaŭe. Li levis la fadenfragmenton sur tiu bordo, ĝin kunligis interplekte kun la fadenfino sur la volvaĵo kaj bone vindis la kuniĝon per alglua rubando. Poste li refoje enpaŝis plaŭde la glacian fluon laŭ sia antaŭe fiksita plano.

Rapide irante al la kontraŭa bordo laŭlonge de la streĉita drato, li etendis je ĉiu paŝo la fadenon spirale ĉirkaŭ ĝi kiel rampantan kreskajon sur arbotrunko.

Tiufoje lin ne minacis la danĝero esti renversita de la glacipecoj. Li eltenis kun kunpremitaj dentoj la dolorigan froston, kiu kuris tra la tuta korpo, kaj koncentrigis sian tutan atenton por plenumi la taskon en plej mallonga tempo kaj refunkciigi la telefonon, tial li pensis nur: "Jam baldaŭ! Post momento! Pli da fortostreĉo!"

Sed jen venis denove malamika aeroplano—unu—kaj rondflugis super la rivero kun kliniĝinta flugilo, sed Hu Pin, kiu laboris fervore en la tumulto de la glacia ondaro, rimarkis nenion. Li rigardis la baldaŭ atingotan bordon kun entuziasmo kaj diris en si: "Ho, baldaŭ! baldaŭ! En kvin minutoj! Pli da fortostreĉo! Estas preferinde fini ĝin unu minuton pli frue ol unu sekundon pli malfrue! Rapide, rapide!..."

Estas vere, ke sur la batalkampo unu minuto aŭ sekundo influas la plenumadon de la tuta batalo. Tiumomente en la regimenta komandejo oni ĵus ricevis urĝan ordonon, kiu postulis, ke la tuta regimento ĵetu sin sur la malamikon en dek kvin minutoj por doni tujan subtenon al la pozicio de la frata trupo ĉe la maldekstra alo, ĉar la Usona trupo, kiu hieraŭ lanĉis ĉi tie furiozan ofensivon kaj ricevis fatalan rebaton, nun jam ŝovis denove sian retiritan kapon tien kun blinda aŭdaco. La politika komisaro tuj komisiis la taskon al la unua kaj tria batalionoj per telefono.

La regimentestro rigardis senpacience la montrilojn sur la brakhorloĝo: "Ho, restas nur kvar minutoj!"

"Via horloĝo fruas eble? Ĉu hieraŭ vespere ni ne ĝustigis niajn samtempe laŭ tiu de la diviziestro?" La politika komisaro levis sian manikon kaj rigardis atente al la manradiko: "Laŭ mia restas ankoraŭ kvin kaj duono!"

"Hm—"

"Nu, ni tuj sendu rajdantan komunikiston..."

"Tio postulos almenaŭ duonhoron..."

La regimentestro hezitis momente kun klinita kapo kaj li diris preskaŭ samtempe kun la komisaro:

"Sed, se la telefono ankoraŭ ne funkcius post duon-horo?—Jam sendu!"

\* \* \*

Dume la malamika aeroplano komencis frenezan pafadon super la rivero.

Pumpumpumpum... Kun rapidaj kaj laŭtaj sinsekvaj pafoj el maŝinpafilego, la aeroplanaj flugiloj preterfajfis super la kapo de Hu Pin. Li eklevis sian kapon kvazaŭ ekvekita de io kaj vidis, ke griza aeroplano kun du grizaj buloj pendantaj sur la flugilpintoj rapidis en nubaron kun levita kapo kvazaŭ persekutata.

"Ha! Malbenita—vi venas denove!" Li ne povas reteni sin de blasfemado. De tempo al tempo li turnis sin por observi atente la movadon de la aeroplano, sed samtempe ne ĉesis volvadi la fadenon fervore kaj ĉiam kun pli granda rapideco.

Li estis tuj atingonta la bordon, sed la malamika aeroplano, desegninte duoncirklon en la spaco, mal-supreniĝis rapidege. Li firme tenis la draton en la mano kaj sin enakvigis kun hasteco.

Pumpumpum... Vico da tromboj leviĝis laŭlonge de la riverbordo.

Kiam la malamika aeroplano preterpasis la akvosupraĵon, Hu Pin jam elmergis sin de la glacia fluo, volvis rapidege la fadenon ĝis sur la bordo, kaj poste ĵetis sin sub la pinon kun flugaj paŝoj.

Pum—pumpum—pumpumpum... Superkape preterbruis denove krakado de maŝinpafilego.

Li kuŝis surventre kaj persistis kun dentkunpremo dum la lasta kelkdeko da sekundoj por fine kunligi la telefonan fadenon. Li kontaktigis ĝin kun la aparato kaj sonorigis. Serio da rapidaj sonorilaj sonoj tiel laŭtaj kaj klaraj ekeniris en liajn orelojn.

La malamika aeroplano denove blinde elsendis du pafarojn kaj forflugis zumante.

En tiu momento liaj manoj kaj piedoj jam tute sensentiĝis pro la frosto. Li eksentis ĝisostan doloregon tra la tuta korpo ke li ne povis eĉ teni siajn dentojn kunpremitaj pro la frosto, sensentiĝo, rigidiĝo kaj konvulsiado. Plurfoje li baraktis por leviĝi, sed la frostigitaj membroj peziĝis kvazaŭ sub la premado de mil ŝtonoj kaj li tute ne povis leviĝi. Fine li perdis la konscion svene, ĉirkaŭbrakante la aparaton per la maldekstra mano, tenante la aŭdilon en la dekstra kaj kun la lipoj restantaj eĉ la kuniĝo de la fadeno.

Kiam li rekonsciigis, li kuŝis sub varma kovrilo remburita de anasa lanugo. La direktoro karesis lian

frunton per la mano, rigardante al lia kvazaŭ ĵus eldormiĝanta vizaĝo kaj diris kun ĝojsurpriziĝo:

“Ho, fine vi rekonsciigis pro la varmo! Kiel vi nun fartas?”

“Tre—tre komforta.” Liaj lipoj kaj langpinto montriĝis ankoraŭ iom rigidaj.

“Kaj en via koro?”

“Tre—tre kontenta.”

La direktoro ŝovis delikate sian varman manplaton sub la kovrilon kaj karesis zorgeme tien kaj reen tra lia korpo kvazaŭ kuracisto esplorus malsanon.

“Ho, la brakoj kaj la kruroj restas ankoraŭ glaciaj.”

“Ne gravas!—mi povas plenumi taskon eĉ nun, se vi komisius al mi iun.”

“Nu, sed vi jam tiel frostiĝis, ke...”

“Ne estas menciinde. Kvankam mi mem iom frostiĝis, sed mil milionoj da homoj en la mondo jam gajnos pli multe da varmo!”

“.....”

Ili rigardis silente unu la alian kaj samtempe ekridis kontente.

Tradukis S. J.

## LA LUMO DE ĈINIO

(daŭrigo de p. 169)

malnova Ĉinio, freŝnovaj vendejoj estas malfermataj, plenigitaj tuttage kaj ĉiutage, de amasoj da aĉetantoj—la librovendejoj.

Fine, kio impresas plej neforigeble sur niajn mensojn kaj korojn estas renkonti kelkajn el la centoj da miloj da tiuj kiuj konsistigas la avangardon, la plej bonaj batalantoj de la ĉina popolo: mi parolas pri la kadroj.

Por la orelo de okcidenta burĝo la vorto “kadro” ne signifas la saman aĵon kiel la vorto *kan pu* signifas ĉi tie. Ĉar la kadroj de nova Ĉinio ne estas viroj kaj virinoj metitaj super la popolamasoj, ili ne estas estajoj apartaj. Ĉu ni parolu pri la plej seriozaj, militemaj revoluciuloj, aŭ tiu admirinda junularo kiu plenigas la universitatojn—la popolaj universitatoj, la revoluciaj lernejoj—la kadroj de nova Ĉinio estas vere la karno de la popolo; ili estas ĝia emanaĵo. Ili enradikiĝas en la homa oceano de laboristoj, kamparanoj, kaj armeanoj, sin nutras per la suko de ĉi tiu granda popolo kies emanaĵo ili estas. Ĉu ili venis de batalkampoj aŭ de fabrikoj, de la universitato aŭ de la laboratorio, ili komune havas amon al la popolo, kuraĝon, modestecon, simplecon, energion, kaj inteligentecon akiritan de konstanta kontakto kun la problemoj, malfacilaĵoj kaj esperoj de la popolo. Multaj el ili, inter la pliaĝaj, jam studis marksismo-leninismo en la karceroj de Kuomintang. Nenio povas anstataŭi la sperton kiun ili gajnis. Ili ensorbis sian vibrantan kulturon en la mezo de bataloj kaj malfaciloj, sub persekutoj kaj suferoj. La junuloj, kiujn mi renkontis en la universitatoj kiuj fine malfermis siajn pordojn al la filoj de laboristoj, egalvaloras siajn pliaĝulojn. Ili estas la heredantoj de la studentoj de la Majo-kvara Movado, de tiuj junaj ribelantaj laboristoj en Ŝanhajo en 1919, de tiu altestiminda junulo kies vizaĝo estas la enkorpiĝo de revolucia heroismo, Vang Ŝaŭ-ho. Ni kunportas al Francio la fotografajojn prenitajn kiam li marŝis al sia morto, tiel ke la franca popolo povu rekoni en li la Azian fraton de niaj martiroj—Jacques Decour, Peri, Catelas, Valentin Feldman.

Sed ne nur per ŝia granda atingiĝo ni kunportos kun ni bildon de Ĉinio. En hazardaj renkontiĝoj en Pekino, Ŝanhajo, Nankino kaj Hangĉoŭ, mi lernis rekoni, estimi kaj ami tiujn kiuj estas la modestaj kaj fervoraj soldatoj de la revolucio, la servantoj de la ĉina popolo, ĝiaj liberigintoj. La nova Ĉinio estas plantanta arbojn kaj forstojn ĉie. Sed la plej bela forsto plantita de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung estas la homa forsto de kadroj kies foliaro brilas en la sunlumo de libereco.

Troviĝas pli multe, treege pli multe, por diri kaj skribi... Sed mi ĉesos ĉi tie provizore... Mi volas aldoni nur unu lastan vorton. Mi jam legis kaj mem uzis centojn da fojoj la frazerojn, “la paca tendaro,” kaj “la pacamaj popoloj.”

Kiam nia aeroplano transpasas la Ĉeĥoslovakian landlimon, ni estas ok tagojn de Pekino pasante Moskvon, Irkuck, Ulan-Bator, dek tagojn de Ŝanhajo, dekdu de Kantono. Kaj tiel tagon post tago la aeroplano kaj la fervoja vagonaro portas nin al lokoj kie la paca kolombo de Picasso flugas sen malhelpo. Ĝi ankaŭ flugis al Parizo, Romo, Londono, kaj okcidenta Germanio, sed tie ĝi estis kelkfoje pafita, vundita aŭ insidita de la polico aganta sub Usonaj ordonoj. Ĉi tie, la kolombo flugas sen pasporto, kaj la suno neniam subiras eĉ la “pacamaj popoloj.” Hodiaŭ, pli bone ol antaŭe, mi konvinkiĝas pri la forteco de la paca tendaro, kaj kial milionoj da batalantoj por paco en kapitalistaj landoj turnas siajn okulojn kun konfido al la oriento, al la Sovetunio, la Popolaj Demokratioj, al Ĉinio—al la giganta paca fortikaĵo de homaj esperoj.

Tradukis Pandišo

\* Claude Roy, fama franca verkisto kaj poeto, lastatempe vizitis Ĉinion je la invito de la Ĉina Pacokomitato.

† Kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo.

†† Kontraŭ subaĉeto, kontrabando kaj impostevito, ŝtelado de ŝtatpropaĵoj, fuŝado de laboro kaj uzo de netaŭgaj materialoj, kaj ŝtelado de ŝtataj ekonomiaj informoj.



### Vivu la Ĉina-Islanda Amikeco!

Karaj kamaradoj,

La ĉijarajn numerojn de "El Popola Ĉinio" mi bonorde ricevis kun granda danko. Mi povas diri ke apenaŭ ekzistas tiel interesa kaj bonkvalita gazeto kiel "El Popola Ĉinio". Miriga estas la diverseco de la artikoloj kaj ne malpli multe la trafa kaj bona stilo kaj altkvalita lingvo. Kiam ĉiuj monstroj de kapitalismo kaj malamo al la vivo akriĝas siajn armilojn kaj instigas al milito kontraŭ tiuj landoj kiuj provas konservi la esperon de la homaro pri pli bona kaj feliĉa vivo, tiam estas de senkompara valoro havi tian bonegan organon de la vivo kiel "El Popola Ĉinio". Usona agreso difektas nun la tutan staton de mondaj aferoj kaj politiko. Ĝi ankaŭ ĉi tien venis. La vivkondiĉoj kiuj estis relative bonaj post la milito, nun jam multe malboniĝis. La kapitalistaj regantoj de la respubliko nur pensas pri la profito de la riĉularo.

Islando estiĝis respubliko sendependa en la jaro 1944. Ĝi nun penas defendi sian liberecon kontraŭ Usona malliberigemo same kiel vi. Tial ĉiuj veraj islandanoj respektas la ĉinan novan ŝtatformon, ties popolon kaj batalon por paco kaj libereco.

Vivu la Ĉinia-Islanda amikeco!

Vivu la nova Ĉinio!

Kamarade kaj amikece salutas  
Arnor Hannibalsson

### La Esperantistoj Devas Stari ĉe la Unua Vico en la Batalo kontraŭ Bakteria Milito

Malantaŭenŝovante la limojn de abomeno, la Usonaj regantoj uzas en Koreio militmetodojn kiuj skribas por ĉiam ilian nomon sur la kolono de malhonoro. Tiuj barbaroj faras la bakteriologian militon, kiu mortigas sen ia ajn distingo la infanojn, virinojn, maljunulojn.

Honestaj homoj apenaŭ povas kredi ke povas ekzisti tiaj krimuloj en la 20-a jarcento, ili emas opinii ke tio estas "komunista" propagando. Tamen ili devas pripensi la jenajn informojn, inter multe da aliaj:

En artikolo publikigita en aŭgusto 1947 en "Science Illustrated" generalo Vent skribis:

"Pere de bakterioj, oni povas detruigi la loĝantaron ne detruante la provizojn nek la transportrimedojn. La okupanto trovas ilin en perfekta stato. La venonta mondmilito povus esti rekomencata kun sukceso, uzante la bakteriologian militon."

En Majo 1948, en raporto de S-ro Thornton Page, oni povis legi:

"La disvastiĝo de infektaj malsanoj starigos rezultatojn eĉ pli gravajn ol la uzo de atombombo, se oni konsideras la rilaton inter la nombro da viktimoj kaj la elspezoj."

Fine, Usono (kun Japanio, kiu cetere jam uzis la bakteriologian

armilon kontraŭ Ĉinio dum la lasta milito) estas la sola lando kiu ne subskribis la internacian kontrakton de 1925 malpermesantan la uzon de la asfiksigasoj kaj de la bakteriologiaj rimedoj. Kial Usono ankoraŭ daŭre ignoras tiun kontrakton, se ne por daŭrigi la ĥemian militon en Koreio?

La esperantistoj kvazaŭ unuanime estas pacamantoj. Ili ne povas resti silentaj antaŭ tiaj fikrimoj. Pro tio, en ĉiuj esperantistaj organizaĵoj, ili devas respondi la alvokon de la estraro de la tutmonda packonsilantaro, kiu postulas ke la Kontrakto de 1925 estu subskribata kaj respektata de ĉiuj landoj. Protestego devas leviĝi el la tuta mondo kontraŭ teruraj rimedoj kiuj minacas ĉiujn popolojn, kaj la esperantistoj devas stari ĉe la unua vico en tiu batalado.

W. Gilbert, Kontinenta  
sekretario de SEAT

### Per Esperanto por Mondpaco!

Karaj kamaradoj,

Vi scias, ke de la 1-a ĝis la 6-a de julio estis la grava kunsido de la Monda Packonsilantaro. Mi ricevis inviton partopreni ĉi tiun kunsidon je la 3a per telegramo. Aranĝis la aferon M. Robineau. Ŝi antaŭ kelkaj tagoj povis rakonti al k-dino Cotton (membro de sekretario de Monda Packonsilantaro kaj prezidantino de Internacia Virina Ligo, fama franca sciencistino) pri la pozitiva porpaca laboro per Esperanto. K-dino Cotton parolis pri tio kun k-do Joliot-Curie, kaj ili ambaŭ, kaj eĉ pli simpatias kun nia movado. Dum la kongreso mi povis paroli kun k-dino Cotton. Ŝi diris al mi, ke en la sino de la Monda Packonsilantaro ankoraŭ ekzistas multaj anoj, ĉefe inter la Sovetiaj delegitoj, kiuj suspektas la esperantistojn. Ne nun estas la momento por multe diskuti pri Esperanto. Sed ni daŭre laboru kiel ĝis nun, altiru kiel eble plej multajn esperantistojn al paca movado. M. Robineau ekde nun estos invitata regule al la kunsidoj de Franca Nacia Paca Komitato, ŝi verŝajne rapide konvinkos ĉiujn anojn de la komitato. Kaj la franca sekcio ja estas grava parto de la monda pacmovado...

Dum la packongreso en Berlino pluraj eminentuloj preparolis la neceson interrilatiĝi rekte de lando al lando. En fina alvoko estis proponita, ke la Monda Packonsilantaro aranĝu rektajn interrilatojn inter sindikatoj japanaj kaj germanaj. Ĉu vi komprenas, kiel ni povus helpi al la paca kaj al la Esperanta aferoj, se ni tuj aranĝus tiajn interrilatojn. Eĉ se ne eblas starigi tuj sindikatajn interrilatojn, ĉia interligo kun Japanio estus grava avantaĝo! Nun mi havas neniun interligon kun Japanio—ja eĉ ne ekzistis ĝis nun poŝta rilato! Nun mia peto: bonvolu alvoki japanajn k-dojn korespondi kun ni kaj antaŭ ĉio peri leterojn por sindikatoj, (grupoj aŭ tuta organizaĵo), aliajn organizaĵojn, infangrupojn ktp. Se mi havus adresojn, mi tuj ekskribus kiel unua.

Komprenu bone, ĝis nun ĉiu nia laboro venis el nia propra iniciativo. Sed nun venas la iniciativo de la Monda Packonsilantaro! Se ni nun kapablas efektiviĝi tiun rektan deziron, neniun kuraĝos subtaksi ĝian utilecon. Tiam ni do havos senkomparan eblecon, kaj niaj amikoj en la sino de la Monda Pacmovado volonte helpos nin!

Ludoviko Schödl, (2' Neuruppin, Gentzstr. 57, D.D.R. (Germanio)

## Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata  
de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

## ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo — Riĉa Rikolto.*

**Pligrandigu la Batalforton de la Partio.**

**La Lumo de Ĉinio.**

**Kion Mi Vidis en Koreio.**

**La Ĉina Popolo Subtenas la Rezoluciojn de la Monda Paĉkonsilo.**

**La Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo Finkonstruita.**

**Agrara Reformo Efektivigis en Plej Granda Parto de Ĉinio.**

**La Malnova kaj Nova Hejmoj de Ĉu Jung-kang.**

*Nova Ĉinio en Bildoj.*

**Tragikomedio de Kamparana Familio.**

**Kiel Estas Kreita M.R.E.I.**

**Kontraŭ la Glacia Torento de Som-Rivero.**

## PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** (1) **Steve Bennett**, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)  
(2) (por abono:) **A. Keesing**, G. P. O. Box 4886, Sydney.  
(3) (por aĉeto:) **Current Book Distributors**, 40 Market Street, Sydney, NSW.

**Aŭstrio:** **Antonio Balague**, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)

**Belgio:** **Walraevens Rajmundo**, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

**Britlando:** **F-ino F. Paraige**, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)

**Bulgario:** (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)  
(2) **Ivan Kovaĉev**, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

**Ĉeĥoslovakio:** **Burda Rudolf**, Plzen\_palackeho N. ĉ. 6, (Jarabono 50 kĉs.)

**Danlando:** **Borge Astrup**, Ymersvej 32, Randers. (Jarabono 6 kronoj)

**Finnlando:** **Nillo Kavenius**, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)

**Francio:** **Labor-Esperantista Federacio** (Jarabono: Fr. F. 450)

**Germanio:** (1) **Helmut Löffler**, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1. (Jarabono: 6 D.M.)  
(2) **Heiny Knorr**, (24) Hamburg-Wellingsbüttel, Ekerkamp 81.

**Hungario:** (1) **KULTURA**, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)  
(2) **Marton Lajos**, Bors.-u. 2, Budapest, XII, (poŝtkonto 38.187)

**Indonesio:** **Kho Khwat Liat**, Post Box 115, Surabaya, Java.

**Islando:** **Siguldur Gudmundsson**, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)

**Italio:** **Eduardo Zumbo**, Casella postale 226, Torino. (Jarabono: 400 liroj)

**Izraelio:** **Bencion H. Danon**, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

**Japanio:** (jarabono 360 jen-oj)

**Meksikio** (kaj aliaj sudamerikaj landoj): **Jezevo Serrano L.**, Central de Talabareros 72, Col. E. Carranza, Mexico, D. F. (Jarabono: 5 pesoj)

**Nederlando:** (1) **Heroldo de Esperanto**, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)

(2) **Esperanto-Grupo Vaals**, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals

**Pollando:** **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, Warszawa Marszałkowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113) (Jarabono 12 zl.)

**Rumanio:** **Rumana Esperantista Societo**, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

**Svedio:** **Einar Adamson**, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)

**Usono:** (jarabono \$1.25)

**Rim:** Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.